



ESPERANTO

JANUARO 1961

esperanto

JANUARO 1961

54a JARO

REVUO INTERNACIA

N-RO 662 (1)

Fondinto : H. HODLER

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro :
W. Auld, 35 Deer Park, Sauchie, Alloa, (Clackmannan-
shire), Skotlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto
(abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2,
Nederlando. Telefono : (010) 128313. Ĝirkonto : 378964
TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive
la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ**
la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj,
kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represajon
al nia redakcio.

Jara abono (1961) : 11,50 gld. (kun membreco kaj jarlibro
15,— gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld, 1/2 paĝo 64,— gld, 1/4 paĝo 32,— gld,
1/8 paĝo 16,— gld, 1/16 paĝo 8,— gld.

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj.

Teksto de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la
respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A. :

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto kaj aganta prezi-
danto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere
Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi,
Okayama, Japanujo.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47,
Arnhem, Nederlando.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South
Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo,
Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca
3/5, Warszawa, Pollando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo,
Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro : ĉe Mag. Bruno Keppeler, Place Longemalle
16, Genève, Svislando (provizora adreso).

LA FRONTPAĜA BILDO :

Stacidoma Ĝardenaro, Harrogate.
(Foto : Bertram Unne.)

Enhavo

Novjara saluto	1
Redakciaj ŝanĝoj	1
Kondolenco de la Ĝenerala Direktoro de Unesko	2
La dokumento de la Zamenhofa jaro	3
Esperanto kiel literatura lingvo	5
Tosto al la morto	7
La komizio	9
De la redakcio	11

Rubrikoj

Esperantista vivo kaj Nekrologo	2
La internaciaj konkursoj	4
Nia forumo	6
CED	12
APO	12
Novaj libroj	14
La lingva ĥaoso	16
La Juna Vivo	16
Tra la mondo	17
46a U.K.	18
Radio	18
Oficiala informilo	19

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la
redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare
tajpitaj en perfekta Esperanto. Oni skribu sur nur
unu flanko de la papero (prefere en normformato
A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno
maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto.
Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn super-
signojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn
manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko
aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

NOVJARA SALUTO

La plezuriga tasko esprimi novjaran saluton, kaj la devo priparoli niajn esperojn kaj timojn estas, pro doloriga hazardo, mia.

Kiam mi pripensas ke vi, karaj legantoj, troviĝas en okdek landoj, ke niaj vivcirkonstancoj kaj opinioj estas plejeble diversaj kaj ke la sola kunligo inter ni ĉiuj estas la deziro disvastigi la uzadon de la internacia lingvo Esperanto, mi estas mirigita pro la progreso de nia movado.

Milionoj da pundoj kaj dolaroj estas uzitaj por internacie popularigi la anglan kaj usonan lingvojn kaj en ĉiuj viaj landoj mono elspeziĝas por instrui tiujn lingvojn. La rezultoj estas relative mizeraj kompare kun tiuj de ni, senpagaj volontuloj. Niaj rezultoj estas gajnitaj plejparte sen aliaj monrimedoj ol la propraj poŝoj, sen la ebleco proponi materian gajnon al la lernanto kaj, foje, spite la malhelpon de aŭtoritatoj.

Utilas konsideri la ĉefajn kaŭzojn de nia progreso.

La unua estas la meritoj de la fundamenta lingvo kaj ke lojale esperantistoj respektis ĝin, ĉar alie nia lingvo jam estus falinta en dialektojn je la granda ĝojo de niaj kontraŭuloj. Mi, do, forte konsilas ke ĉesu la pasintjaraj harfendaj diskutoj. Ni restu fidelaj al la klare difinita Zamenhofa gramatiko.

La dua kaŭzo de progreso estas niaj metodo kaj rimedoj organizi nin, kiuj estas establita dum la jardekoj je granda kosto de niaj energio kaj amikeco, kaj estas pruvataj, aparte en la nunaj mondcirkonstancoj, esti baze taŭgaj. Tamen tiuj rimedoj ne ĉiam produktas la tre bezonatajn rezultojn. Foje, UEA sendas gravajn al landaj kaj fakaj asocioj sed nur iuj agas aŭ respondas. Similajn spertojn havas ĉi tiuj asocioj je la manoj de siaj filioj. La neta rezulto estas ke la movado nur malgrandskale profitas el venkoj kiuj, plene ekspluatitaj, povus porti avantaĝojn kiujn ni neniam ĝis nun ĝuis. Ekzemple, tro malmulte utiliĝis la unika listo de la Internacia Patrona Komitato por la Zamenhof-Jaro. La kaŭzo estas ke ni ne sukcesas disdividi la laboron kaj certigi ke oni faras ĝin. Estas malfacile tion fari ĉar oni ne povas postuli ke nesalajrata persono plenumu sian promeson. Tamen, se ni ne sukcesos, ni mortigos la aktivulojn kaj neniam trafos la celon. Ni devas pli vaste etendi la ŝarĝojn.

La tria kaŭzo por nia progreso estas la preteco de esperantistoj pagi kaj donaci hejmloke, nacie kaj internacie, iuj malavare kaj eĉ ofere. Sed post la dua mondmilito la internacia movado grave suferis finance kaj prestiĝe pro la neebleco pagi alilanden de tro multaj landoj. Pro tio mankas miloj da anoj de UEA kaj iliaj kotizoj. Ni proponas ke ni honoru la memoron de nia tre ŝatata Prezidanto per donacoj por pagi la kotizojn por esperantistoj en tiuj landoj sed ĉu ni ne povas pledi je tiuj registaroj ke ili permesu la pagon de la, al ili, relative bagatelaj sumoj por konservi la solan efikan ponton inter la popoloj kaj la honoron kaj prestiĝon de siaj landoj.

Mi verkis saluton por mia privata novjara karto kaj mi ĝojas havi la privilegion sendi ĝin ankaŭ al vi ĉiuj :

*La nova jar' feliĉon donu
Kaj ĝojon pro labor' farita.
Amika parolado sonu.
Akorde estu viv' benita.*

H. W. Holmes

REDAKCIAJ ŜANĜOJ

Redakti gazeton aŭ revuon certe ne estas facila laboro. Redakti oficialan organon de organizaĵo neŭtrala, sed tamen akceptanta la fundamentajn homajn rajtojn kaj liberecojn kiel sian agadbazon; krome, de organizaĵo tutmonda, sed tamen plene konscia pri la ekzisto de la nacioj kaj de iliaj apartaĵoj — estas tasko pli ol malfacila kaj respondeca, precipe en mondo disŝirata de antagonismoj. Por trovi kaj konservi ekvilibron inter la postuloj de neŭtraleco kaj tiuj de homeco; inter la principoj de teritoria universalaleco kaj de idea internaciismo, unuflanke, kaj la landaj, regionaj aŭ eĉ lokaj tradicioj, fieroj kaj kulturaj aspiroj, aliflanke, — estas necesaj ne nur talento, inteligento kaj scio, sed ankaŭ komprenemo kaj takto en tre alta grado.

Tial la pozicio de la redaktoro de "Esperanto" estas tiel delikata. Li devas reflektigi en la revuo almenaŭ la esencon de ĉiuj klopodoj de UEA kaj de ĝiaj organoj, de la ĉefaj atingoj en diversaj mondopartoj, de la plej gravaj problemoj, ĉio ĉi, kompreneble, en lingvo modele Zamenhofa kaj en spirito de senkompromisaj aktiva neŭtraleco kaj humanisma internaciismo.

Estis granda bonŝanco, ke en 1955, okaze de la interna reorganizo de la Asocio, unu el niaj plej grandaj verkistoj kaj poetoj, William Auld, estis preta preni sur sin tiun taskon, kiun li bonege plenumis. Kiam en junio, 1958, malsano kaj troa laceco devigis lin provizore forlasi la postenon, estis denove bonŝanco ke Kirsten Zacho — la animo de la konata eldonejo KoKo — sinofere akceptis la redaktadon, unue en kunlaboro kun H. V. Rasmussen kaj poste sola. Nun, post pli ol dujara kuraĝa kaj lerta laboro en tiu funkcio, ankaŭ ŝin malsano (la decembran numeron ŝi redaktis el hospitalo!) kaj sekva malfortikiĝo devigas rezigni. Kaj William Auld, intertempe plene reakirinta siajn fortojn, denove transprenas la pezan torĉon!

La Estraro de UEA unuanime esprimas tutkoran publikan dankon al Kirsten Zacho pro ŝia fidela servado al la Asocio kaj al la Esperanto-Movado kiel redaktoro de "Esperanto", dezirante al ŝi baldaŭan plenan resaniĝon. Aliflanke la Estraro same kore salutas la reaktiviĝon de William Auld kiel redaktoro.

Du amikaj personoj sindone transprenas unu de la alia en momento de bezono ŝlosilan rolon, sed tiu rolo restas la sama. Imitinda ekzemplo ne nur de reciproka helpemo, sed ankaŭ de respondecosento rilate la Asocion kaj la Esperanto-Movadon entute.

I. L.

KONDOLENCO DE LA ĜENERALA DIREKTORO DE UNESKO

Okaze de la forpaso de la Prezidanto de U.E.A., la Ĝenerala Sekretario de la Asocio ricevis de la Ĝenerala Direktoro de UNESKO, Prof. Vittorino Veronese, en la angla lingvo leteron, kies Esperanta traduko tekstas:

N-ro ODG/RIO/A 369

La 18-an de novembro 1960

Kara Sinjoro,

Kun profunda bedaŭro mi ekscias pri la morto de Profesoro D-ro Giorgio Canuto, Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, kaj mi deziras esprimi al vi mian sinceran kondolencon kaj la simpatiojn de miaj kolegoj, kiuj havis la privilegion renkonti lin. Mi petas vin transdoni al la membroj de Universala Esperanto-Asocio la esprimon de nia profunda simpatio pro tiu ĉi perdo.

Mi notis, ke la Vicprezidanto de via organizaĵo, s-ro H. W. Holmes, O.B.E., funkcios kiel aganta Prezidanto ĝis la sekvanta aŭgusto.

Sincere via

Vittorino Veronese,

Ĝenerala Direktoro

ESPERANTISTA VIVO

Jubileoj

La 13an de januaro nia granda verkisto *Julio Baghy* fariĝos 70-jara, kaj samtempe li festos sian 50-jaran esperantistecon. Lia adreso: BUDAPEST VII, Rottenbiller-u. 66, Hungarujo.

La 10an de novembro 1960 festis sian 70-jarecon nia samideano *Ivan Krestanov* en Sofio. Li tutkore dankas al ĉiuj afablaj salutintoj.

NEKROLOGO

Arnaudov. *Ivan Arnaudov*, verkisto, Esperanto-pioniro, veterano el la Domo de la Sciencoj kaj Artoj en Sofio, Bulgarujo, forpasis la 25an de oktobro 1960, en aĝo de 78. Kun Esperanto li konatiĝis jam en 1899, kaj en 1900 li tradukis i.a. el Heine, kaj presigis du versaĵojn en la unua lernolibro de Esp. por bulgaroj, aperinta tiam en Plovdiv. Kondolencon al lia vivkunulino!

Solena Memorigo de Zamenhof ĉe la Kapitulo en Romo

La 24-an de novembro, je la 18-a horo, havis lokon en Romo la jam anoncita memorigo de Zamenhof en la historia salono de la Bustoj en la Kapitulo, laŭ iniciato de la Internacia Komitato por la Unueco kaj la Universaleco de la Kulturo, en la kadro de la manifestacioj rekomenditaj de UNESKO.

Je nomo de la Urbestaro de Romo portis la saluton la skabeno D'Andrea, kiu poste lasis la lokon al la eksterlanda Prezidanto de la Komitato mem, ambasadoro de Britujo. Ĉi tiu, en mallonga enkonduka parolado en itala lingvo, klarigis per tre flataj vortoj la motivon kaj la altan signifon de la manifestacio. Sekvis la Ĝenerala Sekretario de la Komitato, verkisto eks-deputito Eugenio Coselschi, kiu per varmaj, entuziasmaj, konvinkaj esprimoj vekis la viglan atenton de la aŭskultantaro, konsistanta el proksimume 300 personoj, pliparte ne esperantistoj. Fine, faris la festparoladon prof. Carlo Agostini, kiu, dirinte kelkajn vortojn pri Zamenhof kaj ties idealo, skizis la genian verkon de li kreitan, ilustrante per originalaj argumentoj ĝian grandegan simplecon, ĝian nekontesteblan gravecon por la pliproksimigo de la popoloj, la rekonon fare de la plej altaj instancoj kaj la nunan staton de la Esperanto-movado, kiu meritas esti pli kaj pli kuraĝigata de ĉiuj por atingi la altan, homaman celon, kiun Zamenhof, ek de la junaĝo, proponis al si.

La brita ambasadoro, evidente tre favore impresita de la vortoj de prof. Agostini, bedaŭrante, ke li ne povas esprimiĝi en Esperanto, varme dankis la oratoron je nomo de la Komitato, kaj esprimis la deziron, ke la nobla aspiro de la esperantistoj baldaŭ realiĝu.

Sur la podio troviĝis ankaŭ la ambasadoro de Pollando, kaj la itala esperantista pioniro Ekscelenco advokato Raffaele Bagnulo, veninta por la okazo el Bologna. Inter la invititoj ĉe la unua vico sidis la ambasadoro de Kolumbio kaj la ambasadoro doredzino de Peruo, kaj la bulgara kultura ataŝeo.

Inter la esperantistoj troviĝis larĝa reprezentantaro el Bologna kaj Trieste.

Ornamis angulon de la salono, flanke de la podio, granda reproduktaĵo de la hungara poŝtmarko kun la kapo de Zamenhof.

Sendis aliĝtelegramojn la ministroj: Bosco, pri publika instruado; Andreotti, pri Defendo; Gonella, pri Justico; Jervolino, pri Komerca Ŝiparo; la vicministro pri Publika Instruado, Elkan, kaj aliaj aŭtoritatoj.

La radio kaj la televido amplekse raportis pri la manifestacio.

Post la celebrado en la Kapitulo, sesdeko da esperantistoj, kune kun s-ro Coselschi kaj kun la bulgara kultura ataŝeo, kuniĝis por komuna vespermanĝo en apuda restoracio. Post la ŝaŭmvino, la Prezidanto de la Roma Esperantista Grupo, kolonelo Fontanive, al kies entuziasma agado oni ŝuldas la organizadon de la bonege sukcesinta ceremonio, dankis ĉiujn kunlaborantojn, kaj aparte s-ron Coselschi. Ĉi-lasto, siavice, faris alian brilan paroladon kiel varma subtenanto de la Esperantomovado, promesante meti sian tutan agadon je dispono por la atingo de konkretaj rezultoj.

MATERIALO

kiun mi ricevas por la revuo mi daŭre sendas al la nova redaktoro, S-ro W. Auld. Ankaŭ malnovajn manuskriptojn mi sendas.

Kore salutas

Kirsten Zacho

LA DOKUMENTO DE LA ZAMENHOFA JARO

MEMORLIBRO eldonita okaze de la centjara datreveno de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof. Redaktita de Prof. D-ro Ivo Lapenna. Kun kontribuaĵoj de 31 kunlaborantoj. Eld. Universala Esperanto-Asocio, Centro de Esploro kaj Dokumentado, Londono, 1960. 104 p. kun tutpaĝa portreto de Zamenhof, plus 16 bildopaĝoj. 29 x 22.5 cm. Prezo : 12.50 gld. aŭ 50.- steloj.

Jen la delonge atendita memorlibro okaze de la centjaro de Zamenhof, distingite vestita en palflava, tuttola bindaĵo kun ora titolo, bele presita sur tre bonkvalita papero en plaĉa, dukolumna aranĝo, kun plej varia enhavo, kaj provizita per riĉa bildaro. Digna dokumento, kara kaj utila al ĉiu esperantisto.

Parto de la materialo aperis, kiel oni scias, en ĉi tiu revuo dum la Zamenhofa jaro. Tiujn reprezentajn artikolojn oni kun plezuro retrovas en la volumo por relegado kaj por tenado profite al estonta uzado. Sed al tiuj ĉi ofte brilaj kontribuaĵoj aldoniĝis pluraj aliaj bonaj, ĝis nun ne aperintaj artikoloj. El ĉio ĉi rezultigis, sub la redakta mano de la granda organizinto de la Zamenhofa jaro, Lapenna, ne nur bela kaj valora memora dokumento, sed vere interesa, eĉ distra referenca libro, kiu valoras universalan disvastiĝon inter la esperantistoj.

Trafoiuminte la libron kun la rapide alternigantaj tekstoj, inter kiuj spicas citaĵoj de Zamenhof kaj poemoj de Kalocsay, Privat, Thorsen kaj Szilagy, oni restas por momento sen spiro antaŭ la tasko redoni juste eĥon de ĉiuj voĉoj, kiuj aŭdiĝas el ĝiaj folioj, paroloj de ama rememorado, de sobra dokumentado, de scienca analizado, de verva artismo, de varma pledo.

Tre utila estas la detalplena (9-paĝa!) kronologia tabelo de Roland Jossinet pri gravaj okazintaĵoj en la vivo de Zamenhof, kun indiko de referencoj. Interese cetere, ke kelkaj el tiuj referencoj estas rezultoj de esploroj faritaj dum la lastaj jaroj. Digna peco de kompila dokumentado.

Pri Zamenhof mem verkis profesoroj Waringhien kaj Privat. En admirinde konciza kaj klara analizo Waringhien vivigas antaŭ ni la multifacetan genion de nia majstro, lian gigantan kreo-forton, resumante liajn atingitaĵojn kiel lingva eksperimentisto, kiel lingvisto, tradukisto, pensulo, kaj ankaŭ skizante tre vivige liajn homajn trajtojn. Tre bele aldoniĝas la biografieto de Privat, kiu skizas la vivon de Zamenhof metante la streĉon sur la granda signifo, kiun havis lia personeco

al la publiko pere de la universalaj kongresoj kaj pere de la homaj idealoj, por kiuj li pledadis. Tre interesaj kaj valoraj estas la novaj informoj pri la rilato de Tolstoj al Esperanto, verkitaj de Kolobanov surbaze de la Plena Verkaro de Tolstoj kaj aperintaj ĉi tie kiel mallongigita traduko de rusingva studo. Fighiera verkis bone pripensitan saĝan artikolon pri la rolo de Zamenhof por la disvolviĝo de organizita movado.

Rondigas kortuŝe la bildon pri Zamenhof rememoroj de Adam Z. pri la lastaj jaroj de sia patro, dum la franca oftalmologo, d-ro Albault, memorigas Zamenhof kiel sian kolegon de oftalmologio.

Kun simpatio mi legis la sobran prijuĝon de Marjorie Boulton pri Zamenhof kiel pionira poeto, pri la grava rolo, kiun ludis liaj poemoj por la unua disvolviĝo de originala literaturo de nia lingvo. Bone ĝin suplementas la instruaj rimarkoj de John Francis pri la verkado poezia kaj proza de Zamenhof.

Pluraj aŭtoroj pritraktas la kapablojn de Esperanto kiel esprimilo de beletra literaturo, kontribuis fakaj literaturistoj kiel magistro Auld kaj d-rino Conterno Guglielminetti. Auld verkis tre interesan traktaton pri la Internacia Lingvo kiel belarta tradukilo. Liaj esploroj baziĝas sur tri famaj klasikaj poemoj, nome de Baudelaire (franca originalo), William Blake (angla originalo) kaj Puŝkin (rusa originalo); li komparas esperantan tradukon el ili kun respektive angla, franca kaj angla tradukoj. Liaj komparoj estas tre instruaj, kaj espereble la aŭtoro pluiros per similaj esploroj, en kiuj li povus iomete plivastigi, mi tion sugestas, la ĝeneralajn konkludojn pri unuopaj poemtradukoj. Tre leginda studo!

D-rino Conterno Guglielminetti skribas pri naskiĝo de literaturaj lingvoj komparante la unuan disvolviĝon de Esperanto kun tiu de naciaj lingvoj. Profesoro Régulo Pérez bone resumas la atingitaĵojn de tiu disvolviĝo en artikolo pri Esperantujo, "lando", kiu plej bone respondas al la idealoj de Libereco, Egaleco kaj Frateco.

Serio da artikoloj pritraktas analize la kvalitojn de Esperanto el diversaj vidpunktoj kaj por diversaj specifaj celoj. Tiel profesoro Collinson kun sia alta aŭtoritateco prilumas Esperanton el vidpunkto de lingvistiko, alia elstara lingvosciencisto, profesoro Bokarev, resumas komparon inter Esperanto kaj diversaj projektoj de lingvo internacia klarigante konvinke la kialojn de la vivforto de la Zamenhofa lingvo, dum profesoro Lapenna aldonas al tiuj ĉi kialoj kelkajn aliajn, precipe sociajn. Fine Julia Isbrucker pritraktas la perspektivojn de Esperanto en rilato al la mondfederalismo. Kontente oni trovas en la volumo resumon pri la komparo inter naciaj lingvoj (ekzempligita per la angla lingvo) kaj Esperanto surbaze de la konataj vortstatistikaj studoj de Setälä. Tiun resumon devus ne nur legi, sed scii ĉiu esperantisto.

Pri la mondlingva problemo ĝenerale estas donita traduko de parolado farita de la antaŭa rektoro de la Universitato de Helsinko, profesoro Ravila, membro de la Akademio de Finnlando. Lia atentinda fundamenta tezo, pri kiu li detaligas, estas, ke la naciaj lingvoj ne povas respeguli ĉu eŭropan ĉu tutmondan kulturon, tion povas fari nur lingvo internacia.

Preston Davis prezentas kelkajn interesajn vidpunktojn el la teorio de komunikado en rigardo al Esperanto kaj ĝiaj avantaĝoj tiurilate pro fonetikeco kaj skemeca strukturo. Kaj D-do Makkink en detala artikolo pritraktas ĝenerale la rolon de Esperanto en la evoluo mem de komunikado.

Sekvas nun alia serio de artikoloj, kiuj fokusas la eblojn kaj la rolon de Esperanto en la natursciencoj. Nia karmemora prezidanto, profesoro Canuto enkonduke kunigas bazajn informojn pri la atingita apliko de la lingvo sur tiu ĉi kampo, la japana profesoro Nishi skribas pri siaj propraj spertoj kiel esperantisto kaj pri la lingva problemo en sciencaj rondoj de Japanujo, kie ja miloj da studentoj kaj sciencistoj studas kaj uzas la lingvon. Kaj profesoro Sirk, kiun ni perdis dum la jaro, rakontas el siaj personaj spertoj kiel sciencisto uzinta naciajn lingvojn kaj Esperanton antaŭ nesamlandoj; kiel ĉiam el lia plumo modela informa artikolo. Støp-Bowitz faras tre klaran analizon pri la lingva problemo de la sciencistoj, komparante la eblojn de la angla kun la esperanta.

Finas la temgrupojn de la libro traktoj pri Esperanto kaj la infanoj. David Kennedy verkis dokumentoplenan artikolon pri la lastaj progresoj de la lerneja instruado de nia lingvo kaj la grandaj ebloj dokumentitaj per internacia kunagado de infangrupoj. Rev. F. Moravec rakontas kompetente kaj sobre pri spertoj koncerne al Esperanto kiel familia lingvo, gravega temo, kiu atendas sian traktadon en lingvistika monografio.

Al f-ino Vermaas ni ŝuldas resuman trarigardon pri la celebrado de la Zamenhof-Jaro, atestantan

pri la vastaj sukcesoj atingitaj en sume 46 landoj, kiuj iamaniere partoprenis la festadojn laste kronitajn per la decido de UNESKO oficiale honorigi la centjaran datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof.

16 el la grandformataj paĝoj enhavas proksimume centon da bildoj pri la vivo de Zamenhof kaj la celebrado de la Jaro. Eble kelkaj el ili povus sen domaĝo esti ellasitaj kiel tro negativaj, sed multaj el ili havas historian valoron kaj aldonas al la riĉeco de la libro.

Sume, restas denove al ni tutkore aklami la aperigon de tiu ĉi konkluda manifestacio pri la grandaj festoj de 1959. Kaj estas nur juste, se ĉi tie mi direktas, en la nomo de la tuta Esperanto-movado, varman dankon kaj koran gratulon al profesoro Lapenna, ne nur pro la kompilo de tiu ĉi grava historia dokumento kaj referenca libro pri la personeco de Zamenhof kaj pri gravaj faktoj en la nuna stato de la Esperanto-movado, sed precipe pro la giganta kaj insista laborado, kiun li faris el sia modesta oficejo en Londono por organizi la tutmondan festadon pri la iniciatoro de nia lingvo kaj per tio konsiderindan antaŭenpuŝon de la movado en multaj landaj kaj medioj.

Paul Neergaard

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1960

Stato je la 30-a de novembro

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Japanujo	2470	2860	115,79
2.	Nederlando	5093	5461	107,23
3.	Usono	3430	3610	105,25
4.	Belgujo	1985	2071	104,33
5.	Svislando	2075	2120	102,17
6.	Britujo	6566	6678	101,71
7.	Francujo	7111	7221	101,55
8.	Jugoslavio	7155	7090	99,09
9.	Germanujo	7450	7300	97,99
10.	Finnlando	2515	2400	95,43
11.	Svedujo	6605	6300	95,38
12.	Norvegujo	2035	1883	92,53
13.	Hispanujo	2837	2585	91,12
14.	Danlando	2921	2565	87,81
15.	Italujo	4469	3820	85,48
16.	Brazilo	8260	4097	49,60

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Argentino	815	940	115,34
2.	Aŭstrujo	1425	1580	110,88
3.	Kanado	615	665	108,13
4.	Aŭstralio	1076	1136	105,58
5.	Sudaŭfriko	250	255	102,—
6.	Novzelando	989	965	97,57
7.	Israelo	250	240	96,—
8.	Portugalujo	575	535	93,04
9.	Urugvajo	255	230	90,20
10.	Madagaskaro	250	212	84,80
11.	Islando	270	215	79,63
12.	Maroko	256	190	74,22

ESPERANTO KIEL LITERATURA LINGVO

Literatura lingvo estas lingvo en kiu estas kreitaj verkoj de literatura valoro. Tio estas simpla, evidenta kaj nediskutebla fakto. La sola parto de tiu difino, pri kiu oni povas disputi, estas la preciza signifo de la vortoj "de literatura valoro"; kaj, escepte de unuopaj limverkoj, pri kiuj dubo povas ekzisti, praktike ekzistas ĝenerale rekonata kaj rekonebla nivelo, kiun devas atingi verko por esti literatura. Kun maloftaj, individuaj esceptoj, literaturajn verkojn agnoskas ĉiuj kompetentuloj, kiuj legas ilin. Sekve, ĉar verkoj de literatura valoro estas kreitaj en Esperanto, — kion povas ĉiu homo kontroli mem, — Esperanto estas literatura lingvo.

Kelkaj homoj eble opinias, ke la nombro de libroj eldonitaj en iu lingvo iel influas ĝian literaturan valoron. Tia opinio ŝajnas nemotivita. Influas nur la nombro de *libroj literature valoraj*. Gravas ne la nombro de talentaj verkistoj en tiu lingvo; unusola geniulo, kiu verkas en iu lingvo, kapablas per si mem valorigi tiun lingvon. Pli ol unu alilandano jam lernis la norvegan lingvon kun la sola celo, legi la dramojn de Ibsen (1). Ĝis nun neniu kuraĝis aserti, ke la kimra lingvo ne estas literatura lingvo; tiurilate kelkaj faktoj estas por ni interesaj:

"Iom pli ol cent libroj eldoniĝas en la kimra lingvo ĉiujare, kaj pasintjare seso da romanoj estis eldonitaj en tiu lingvo/.../ Tio estas ne malgranda atingo de kimreparolanta loĝantaro ampleksanta malpli ol unu miliono, sed ĝi ne sufiĉas. La daŭra vivado de nia lingvo dependas de tio, ke ni kvarobligu la nombron de niaj eldonaĵoj." (2)

Simile, la esperante-parolanta "popolo" ampleksas malpli ol unu miliono; ĉiujare eldoniĝas en Esperanto proksimume cent libroj, inkluzive de manpleno da romanoj. Kompreneble, kiel en la kimra, tiel ankaŭ en Esperanto, nur ono de la ĉiujara eldonaĵaro konsistas el verkoj *literature valoraj*; tamen tiu ono ekzistas. Sendube multaj esperantistoj same simpatias kun la plua korokrio de la sama aŭtoro: "La kimra lingvo eble ŝajnos malgrava al multaj. Por ni, kiuj trovas nian plenumiĝon verkante per ĝi, kaj por tiuj, kiuj trovas sian plej grandan plezuron legante en ĝi, ĝi estas ĉio." Tio estas eterna sento de tiuj, kies lingvo estas "malgrava" (laŭ kiu rajto oni verdiktas tiel?) ĉar — ĝi estas "malgranda". Sed tute objekte oni devas konstati, ke ĉiu lingvo estas, laŭ universala vid-

punkto, "grava", kiu posedas gravajn kulturajn verkojn, kiuj povas ion kontribui al la ĝenerala kulturo de la homaro.

Sed tro ofte la kulturaj atingoj de iu lingvo estas ignorataj aŭ eĉ rifuzataj ĝuste ĉar la lingvo estas "malgranda". Lastatempe oni skribis al mi pri iu nederlandano: "Tiu ĉi verkistino, se hazarde ŝi apartenus al pli granda lingva teritorio, sendube havus famon en la mondo..." Mi ne dubas, ke io simila estas vera pri multaj verkistoj, kiuj elektis (aŭ estis devigitaj) verki en "malgranda" lingvo. Ĉiu "malgrandlingvulo" povas citi tiajn nomojn, kaj ĉiu esperantisto el la "grandlingvaj" teritorioj estas feliĉa tiurilate, ke li havas okazon konatiĝi, eĉ supraĵe, kun tiaj verkistoj en esperantaj tradukoj — por citi nur du-tri, kiuj hazarde saltas en mian menson nunmomente: Stamatov, Karaslavov, Marie Under, Madách, Petöfi, Ady, Havlíček Borovský, k.m.a.

Kaj tamen tiuj aŭtoroj kimraj, bulgaraj, estonaj, hungaraj, ĉeĥaj, ktp., kvankam iliaj lingvoj estas "malgrandaj", havas unu avantaĝon, kiun ne havas ĝis nun la aŭtoroj de Esperanto: nur stultulo monumente kretena kuraĝus diri, ke iliaj lingvoj ne estas literaturaj. Male, malgraŭ niaj Kalocsay, Baghy, Lapenna, Boulton, Szilágyi, Szathmári, ktp, ktp, ĉiu muknaza bubo aŭ orgojla filologo povas facilanime aserti, ke Esperanto ne kapablas je literaturo. Feliĉe, tio iom post iom fariĝas pli malfacila, ĉar niaj faktoj, kaj niaj valoroj kaj eĉ prestiĝo, ĉiutage kreskas.

Estas ĉiukaze maltrafe diri, ke iu ajn lingvo "ne kapablas je literaturo" (aŭ je io ajn), ĉar ĉiu lingvo estas precize tiel kapabla kiel estas ĝiaj uzantoj, sen kiuj lingvo nenion kapablas ĉar ĝi tiam ne ekzistas. Unuavide tiu pretendo eble ŝajnos troigita al kelkaj, kiuj volas aserti, ke ekzistas primitivaj lingvoj de primitivaj popoloj, kies krudeco kaj limigita vortprovizo malebligas la kreon de literaturo. Mi ne scias, ĉu fakte ekzistas tiaj lingvoj — laŭ miaj ĝisnunaj spertoj eĉ la t.n. "primitivaj" lingvoj havas siajn popolkantojn kaj baladojn (3), kies plej elstaraj specimenoj restas fieraj eĉ ĉe poste plievoluintaj lingvoj — sed mi scias, ke tuj kiam la uzantoj de tia lingvo eksentus la bezonon krei literaturon, tiam la lingvo montriĝus kapabla por tio. Ĉar ĉiu lingvo ekspancias kaj evoluigas, kiam sentiĝas novaj bezonoj al ĝiaj uzantoj. Tion oni povas konstati pri ĉiuj "kulturlingvoj", kies historion oni studas. Geniaj verkistoj, strebante al pli altaj literaturaj niveloj, kvazaŭ perforte remuldis la lingvon por ĝin egaligi al iliaj bezonoj; ĉiutage novaj konceptoj kaj

(1) ekz-e.: "La tradukintino de tiu ĉi volumo..... decidis antaŭ proksimume dudek jaroj, ke Ibsen 'valoras unu lingvon', kaj komencis lerni la norvegan por pli bone kompreni la dramojn jam tradukitajn kaj por legi tiujn malmultajn, kiuj ankoraŭ ne estis tradukitaj" (Faldklapo de "Ibsen: Three Plays, Harmondsworth, 1950).

(2) New Statesman, Londono, N-ro 1373, 6.VII,1957.

(3) Vd. ekz. tradukojn de eskimaj poemoj en "Rozoj kaj urukoj" de Poul Thorsen, Kopenhago, 1954.

novaj kreaĵoj postulas novan terminaron (ekz-e en psikologio, ekonomio, la sciencoj, kiuj ĉiuj siaflanke influas ankaŭ la beletron). Kaj la bezonantoj de novaj terminoj evoluigas la lingvon per unu aŭ ambaŭ el du metodoj: aŭ oni enprenas terminojn el aliaj lingvoj ilin jam posedantaj, aŭ oni adaptas aŭ rearanĝas la jam ekzistantan, por tiel diri: indiĝenan, vortmaterialon (4).

Kompreneble tiu evolua procedo, precipe en frua stadio de literatura ekspansio, vekas protestojn ĉe reakciuloj. En angla lingvo, ekzemple, du el la plej fekundaj novigantoj estis Edmund Spenser (1552-1599) kaj William Shakespeare (1564-1616). Precipe la unua el ili vekis konsiderindan kontraŭstaron, kiam li enkondukis vortojn kaj esprimojn — kaj ne malpli, kiam li revivigis arĥaikiĝintajn formojn, aŭ utiligis viglajn dialektaĵojn. La polemiko estis sufiĉe akra:

"Nia patruja lingvo, kiu vere en si mem estas samtempe sufiĉe riĉa por prozo kaj sufiĉe digna por poezio, estas jam delonge juĝita tre nuda kaj sterila je ambaŭ. Kiam iuj klopodis kuraci kaj rebonigi tiun mankon, ili flikis la truojn per pecetoj kaj ĉifonoj el aliaj lingvoj, prunteprenante jen de la franca, jen de la itala, ĉie de la latina, ne konsiderante, kiel malbone tiuj lingvoj akordiĝas inter si, sed pli malbone kun la nia, tiel ke nun ili faris el nia angla lingvo galimation aŭ miksaĵon el ĉiuj aliaj lingvoj. Aliaj, eble ne tiel bone fundamentitaj en angla lingvo kiel en iuj aliaj lingvoj, se hazarde ili aŭdas malnoviĝintan vorton, kvankam tre naturan kaj signifoplenan, tuj ekkrias, ke ni parolas nenian anglaĵon, sed sensen-

caĵon....." (5).

Skizinte tiel la situacion, la aŭtoro daŭrigas per atako kontraŭ tiuj, kiuj "havas tiel fian sintenon kaj bastardan juĝkapablon, ke ili ne nur ne volas mem labori por ornami kaj beligi ĝin — la anglan lingvon — sed ankaŭ plendas ĉar ĝi estas ornamita de aliaj."

Superflue diri, ke sennombraj vortoj, uzitaj tiam de Spenser kaj atakitaj de konservativuloj, jam delonge eniris la ĉiutagan anglan lingvon kaj indiĝeniĝis. Kaj ni trovas, ke hodiaŭ, kvarcent jarojn post Spenser, ĝuste tiu multorigineco estas plej forte laŭdata kvalito de la angla lingvo:

"Unua kaj plej grava estas ĝia eksterordinare akceptema kaj adaptema heterogeneco — la varia facileco kaj preteco, laŭ kiuj ĝi alprenis al si materialon de preskaŭ ĉie en la mondo, kaj proprigis al si la novajn lingvo-elementojn." (6)

La saman procedon oni povas konstati en pli modernaj tempoj ĉe iuj lingvoj, kiuj fariĝis "kulturaj" relative lastatempe, ekz-e la finna, la serbokroata, la litova, ktp. Mallonge, la lingvo estas precize tiel "kapabla", kiel ĝiaj uzantoj, kiuj kapablas laŭnecese kapabligi ĝin laŭ la sentataj bezonoj.

Por sumigi:

- (i) Lingvo vivas nur pere de ĝiaj uzantoj.
- (ii) Literatura lingvo estas lingvo uzita por krei literaturon.
- (iii) En Esperanto, literaturo estas kreita, sekve Esperanto estas literatura lingvo.

(daŭrigota)

WILLIAM AULD

(4) Laŭ Berg: "A Dictionary of New Words in English" (Vortaro de novaj vortoj en la angla), 1953, ekzemple, en la anglan lingvon inter proks. 1930 kaj 1950 enkondukiĝis 2042 novaj vortoj.

(5) Antaŭskribo al "The Shepheardes Calender", Londono, 1579.

(6) C. L. Wrenn: The English Language, Londono, 1949, p. 6.

NIA FORUMO

Esperanto en Olimpiadon!

Esperanto ne estas celo sed estas rimedo. Tio estas konstato, kun kiu ĉiu akordiĝos, sed tamen mi opinias, ke ĝi ne estas tenata sufiĉe en vido. La agado de la esperantistoj kaj de la esperantaj kluboj estas direktata precipe al la propagando kaj ellerno de la lingvo, sed malsufiĉe al ĝia praktika utiligo. La kongresoj estas tenataj inter la esperantistoj kaj estas malmulte rimarkataj de la neesperantista publiko. Ekzemple, mi neniam vidas ian mencion pri Esperanto en la brita gazetaro. Mi estas konvinkita, ke tre multaj individuoj kaj tutaj klasoj ne scias pri ĝia ekzisto. Ni devus korektiti tion.

Cu la plej favoraj okazoj fari tion estas utiligitaj? Jen! Antaŭnelonge la roma Olimpiado okazis. Esperanto

povis esti ligilo inter multegaj nacioj kiuj kunvenis, kiuj estis ligitaj korpe en granda harmonio de la sporto, sed ili estis malkapablaj proksimiĝi spirite. Mi ne scias, kiaj klopodoj estis faritaj je tiu okazo por la uzo de Esperanto, sed ili restis nerimarkitaj.

Post kvar jaroj okazos la sekvanta Olimpiado en Japanujo, kaj mi opinias, ke tio estos granda okazo. Ni devus labori per ĉiuj niaj fortoj, por ke Esperanto pruvu antaŭ la tuta mondo, ke ĝi estas la unika medio, kiu povas atingi la spiritan kompreniĝon inter la popoloj de la plej malsimilaj lingvoj, kiuj alie ne povus kompreniĝi. La fakto mem, ke la Olimpiado okazos ĉe nacio, kies lingvo estas tiel malfacila, estas favora por pruvi, kiel facile Esperanto povas pontumi la malfacilaĵojn. Estas ankaŭ utile, ke la forta japana Movado povos kunhelpi. La Olimpiadoj prezentas aparte bonan okazon, ĉar ili ne estas ligitaj kun politikaj, religiaj aŭ aliaj grupoj.

Tial mi proponas uzi la sekvantajn kvar jarojn por atingi, ke Esperanto estu uzata inter la diversaj naciaj grupoj de la Olimpiado, kaj eble ankaŭ inter la organizantaj grupoj de la Olimpiado.

Bonvolu senkulpigi min se mi troigis, sed mi skribis kun la plej amika intenco.

D-ro Niko Mirošević-Sorgo, Londono.

Virgino?

En "Pri la vortfarado en Esperanto", s-ro J. R. G. Isbrucker asertas, ke, laŭ la principo de sufiĉo, "virgulino" estas pleonasma, ĉar la ideo -ul estas jam entenata en la sufikso -in. Oni do povas simple diri "virgino".

Se tiel estas, kaj ĉar "virg" estas adjektiva radiko, ĉu oni rajtas ankaŭ diri "grandino", "dikino", "blindino", k.c.?

La precedenco aprobita de s-ro Isbrucker ŝajnas danĝera, aŭ, pli moderdire, dubinde imitinda.

F. R. Banham, Melburno.

Tosto al la Morto

Eseo memore al A.P. ĈEHOV

*Estas bezone verki
mallonge, kio signifas
talente.*

A.P.Ĉ.

1860

Azova Maro en verde-blua milnuanco brilis sub la sudrusa suno, sed Antoŝa ne havis tempon observadi ĝin, nek ludi en ĝiaj ondoj.

La havenurbeto Taganrog bruis en la sud-dialekta kriĉobunto, sed Antoŝa ne havis tempon babili kun najbaroj.

1875

Antoŝa, la juna gimnaziano, devis labori por certigi al si la ĉiutagan panon. La knabo Antoŝa, sola en la naskiĝurbo, senigita de la familia sino, senmona, ne desperis, sed sukcesis havigi al si la necesajn vivrimedojn. Per facilaj kaj nefacilaj laboroj. Antoŝa Ĉehov balais kortojn de siaj najbaroj, helpis en iliaj butikoj, instruis siajn kolegojn, la petolemajn bubaĉojn, ĉio ĉi estis nefacilaj laboroj, sed Antoŝa Ĉekonte inventis ankaŭ la facilajn. Kiel ridindaj estis liaj najbaroj, bolintaj en la disputa febro! Kiel simpatiaj estis vilaĝanoj ofertintaj sian varon sur la polvoplana merkato. Estis ja tiel facile skribi humorstilajn leterojn pri siaj najbaroj, amikoj, samurbanoj kaj sendi ilin al la gazetoj. La bonkoraj gazetistoj honorariis tiun facilan laboron. Ho, tamen, bele estas vivi, se oni tiel senpene povas akiri monon. Kaj Antoŝa Ĉekonte elŝiris multajn foliojn al siaj lernejoj kajeroj kaj uzis ilin por skribi anekdotojn, raportafetojn, skizojn, kronikaĵojn, ĉion en la humura stilo, kompreneble, ĉar la tuta laboro ne estis laboro, sed amuzo.

La bonkoraj gazetistoj tre multe observadis la brilludon de la milnuanca Azova Maro kaj la kriĉobunto de la havenurbaj stratoj absorbis ilian tutan atenton. Eĉ ne unu el ili rimarkis, ke la elŝiritaj kajerfolioj de la gimnaziano Ĉekonte emanis ion: la genian verkistan talenton.

1879

Antoŝa kun la matur-ekzamena diplomo en la poŝo, kun ftiz-baciloj en la pulmo kaj modesto-sento en la medolo de l'animo, forlasis la ĉarman bordon de Azova maro kaj la mallarĝajn havenurbajn stratojn anstataŭis per la larĝaj grandurbegaj, en Moskvo. Ho, kiel bela estis Moskvo kun siaj palacoj kaj monumentoj, parkoj kaj promenejoj, rave bela, granda, vasta, sed al li kaj lia familio Moskvo proponis nur mizeran, malgrandan loĝejeton, tro mallarĝan por la multmembra familio Ĉehov kaj kelkaj kolegoj pensionuloj.

Antoŝa, studento de medicino, ne malesperis en la kaduka loĝejeto, ĉar kial desperi, se ekzistis bonkoraj gazetistoj, kiuj volis honorarii la ludlaboron de Antoŝa Ĉekonte. Li verkis cent, ducent eĉ pli da humorafetoj jare. Nokte en la anguleto de la sufoka ĉambreto li ludis per la plumo kaj la humuraj rakontetoj aperadis sur la elŝiritaj kajerfolioj. Vere facila perlaboro! Ne mirige, ke la grandurbegaj trookupitaj gazetistoj ne sukcesis rimarki ke io petole sin kaŝas en la kajerfolioj — la estonta mondfama verkista stilo. Sed Moskvo proponis tiom da ĝojoj, ĝuoj kaj ekscitiĝoj al la talentitaj gazetistoj, ke tiuj vere ne havis tempon atenti la amatoran verkistan laboron de la juna studento de medicino. Krome, liaj humorafetoj estis honorariaj per plej malaltaj honorarioj, kaj nu, ĉu io valora povas esti malmulte pagata en la preso-fako?

Antoŝa Ĉekonte daŭrigis facile perlabori la necesan monon por ke Anton Ĉehov povu fini la malfacilan laboron — la medicinan studon.

1884

Inter la grizaj muroj de la loĝejeto sonis la kanto el la junaj gorgoj. Tostoj honoris la junan diplomiton, Antoŝa Ĉehov doktoriĝis. Ŝajnas, ke la tosto

estis nekutime laŭtaj kaj traborigaj, ili atingis la orelon de la influa ĵurnalisto Suvorin, kiu fine degnis rimarki, ke la noveloj "Arbargardisto" kaj "Kavaĉo" estas la heroldoj de la nova stilo en la rusa literaturo. Mallonga esprimo, reliefa priskribo, konciza vivdesegnaĵo skizita per kelkaj vortoj, sen io troa. Venis la laŭdaj leteroj, aperis la flataj opinioj. Eksterlandaj revuoj postulis la manuskriptojn. Miris la kolegoj, miris la familianoj, sed plej multe miris Doktoro Antoŝa mem, apenaŭ nun konscia ke la verkado ne estis ludo kaj amuzo.

1886

La juna doktoro Ĉehov dum tago en la kuracista konsultejo faris notojn en siaj kajeroj por ke nokte la verkisto Ĉehov el la kelkvortaj, kelkliniaj notoj elforĝu novelojn, rakontojn, dramojn. Antoŝa Ĉekonte estis entombigita por ĉiam, ankaŭ la kutimo verki ducent humoraĵetojn jare, ankaŭ la opinio ke la verkista laboro estas amuzo kaj ludo. La verkisto Ĉehov nun poluris siajn verkojn, korektadis ilin, refaradis, demandis konsilojn de siaj amikoj Gorkij kaj Tolstoj. Verkis nur dudek ĝis tridek rakontojn kaj novelojn jare. La milda humura stilo el lia junaĝo komencis ricevadi dentojn kaj ungojn. Ĉiam pli akre kaj sange li pikis la homan stultecon, etanimecon, poltronecon kaj la socian maljuston, koruptemon, burokratismon, protektismon kaj hipokritecon. Nenio povis eskapi lian penetran kuracistan rigardon. Ankaŭ ne tio, kaŝita malantaŭ la dikaj feraj kradoj.

1890

Li trovis la vojon ĝis la fifama prizono Sahalin. Per la literatura armilo li protestis kontraŭ la reĝimon regantan tie kaj li sukcesis. La policistoj de l'caro devis mildigi la mezepokajn metodojn.

1895

"Mevo", la dramo nekomprenita de la publiko, fuŝe surscenigita de la reĝisoro, la dramo en kiu mankis longaj heroecaj ditiramboj, malsukcesis. Sed la vera kvalito, eĉ piedpremita de la homoj, radias. Ĉiam iu eksentas la forton. La novefondita "Hudoĵestvenij" teatro prenis la forĵetitan "Mevon" kaj faris el ĝi triumfon por la aŭtoro, teatro kaj la rusa dramverkado. Ĝis hodiaŭ mevo salutas, en formo de emblemo, la vizitantojn de la "Hudoĵestvenij" teatro. "La Tri fratinoj", "Ocjo Vanja" kaj "Ĉeriz-gardeno" sekvis la triumfan svingon de la "Mevo"; al multaj teatraj scenejoj en la mondo. La rondiro daŭras ĝis hodiaŭ.

1896

Ne triumfis nur la "Mevo". Ankaŭ ftizbaciloj, pro la nokta laborado, pro trookupiteco de l' verkisto, pro la multaj skribitaj leteroj, ili havis tempon jubili senĝene en la pulmo de l' kuracisto, kiu sanigadis aliajn, sed ne havis tempon zorgi por si mem. Ĉehov devis lasi la larĝajn, grandurbegajn stratojn de Moskvo, ĉar sur ili ofte hurlis la akraj ventoj kaj neĝtempestoj. Tio ne konvenis al la baciloj. Al ili multe pli plaĉis la milda klimato de Jalta, kie la verkisto ek de nun loĝis en la bela somerdomo. Li estis bona najbaro. Li konstruis lernejojn kaj malsanulejojn por siaj kunlokanoj. Li ja ne bezonis por si la tutan monon, kiun oni sendis al li el la tuta mondo. Lia junaĝo instruis lin kontentiĝi nur per la plej bezonataj vivrimedoj. Por li estis bezona nenio krom la milda klimato, skribotablo kaj kareso de l'juna edzino, aktorino.

1904

La ftizbaciloj rongis ĉiam pli kaj pli. Ili ne plu estis kontentaj en la sudrusa klimato, ili postulis la sanatorian flegon. La verkisto obeis. Kun la edzino li forvojaĝis al la germana kuracloko Badenweiler. Tie li apartenis al la agrablaj pacientoj, kiuj ne ĝenis senĉese kuracistojn postulante ilian intervenon. Li ne grumblis, li ne veis. Ankaŭ en la nokto de la 15-a de julio ne vokis la kuraciston li, sed la edzino. Ŝi rimarkis nur, ke la edzo malbone fartas, sed la kuracisto rimarkis, ke la paciento la lastan fojon malbone fartas. Por faciligi la momentojn de l'forpaso, li konsilis ĉampanvinon. Ĉehov prenis la glason, tostis al la edzino kaj kviete eltrinkis la ŝaŭmantan nektaron kaj same kviete elspiris la vivon. La tosto al la edzino estis samtempe la tosto al la morto.

1960

La mallaŭtan toston flustritan en la morto-ĉambro de la germana sanatorio aŭdis la tuta homaro. Ĝi ne forgesis la verkiston Ĉehov. Miloĵ da artikoloj en la tuta mondo rememoras la noveliston Ĉehov, teatroj en multaj urboj kaj lokoj celebradas la dramverkiston Ĉehov. Honore al la modesta kuracisto, kiu konis nur la laboron kaj zorgon por aliaj, nun estas aranĝataj festoj kiujn partoprenas miloj da homoj. En ĉiuj partoj de la mondo. Tosto al la morto transformiĝis en la triumfon de la senmorteco.

Emilija Lapenna

(Premiita en la Belartaj Konkursoj 1960)

LA KOMISIO

Novelo

Albert Samijn

(Daŭrigo)

Lia lasta espero: eble alia vizitanto, eble bakisto aŭ buĉisto venos kaj scios kiamaniere senĝene atingi la diablajn domojn kaj ĝiajn misterajn loĝantojn. — Pasis duonhoron. Neniu. — Li ekstaris, promenis tute malrapide laŭlonge de la heĝo, tra-rigardante ĉiun trueton. Vane! Neniu homa vivsigno en la bieno. Tute sola li estis tie kun du malamikaj hundoj kaj sennombraj birdoj primokantaj lin sur la altaj branĉoj kaj forkantantaj liajn plej belajn revfragmentojn. Subite li furiozis kontraŭ la paketon! Ho, se li povus ĵeti ĝin trans la heĝon sur la kapon de la serĉflarantaj bestaĉoj kaj hejmeniri! Sed tio estis vere buba ideo, malinda de plenaĝulo. Feliĉe, ne ĉiam venas bona ideo post la pereado! Ĉi-foje ĝi ĝustatempe trafis lin kiel poeta inspiro. — La hundoj! Jes, la hundoj helpu lin! Li incitu la buldogojn, sovaĝigu ilin ĝis ili tiel bruegas ke oni nepre eliras la vilaon. Tuj li plenumis sian intencon, kriegante kontraŭ la bestoj, saltante, batante per la paketo sur la heĝon kaj la barilpordon, ĵetante ŝtonetojn trans la heĝon.... Efektive, kiel frenezaj diabloj la hundoj bruegas kaj magie ilia bojegado, kvazaŭ uragano super kvietiga lago, traĉis la silentan kvartalon.

Venis tuj la savo. — "Hej, bubo," kriegis raŭka, kolera voĉo, "ĉesigu, mil diablojn, ĉesigu, mi diras. Kion vi volas? Ĉu mi devas ĵeti vin antaŭ la hundojn? Ĉu vi frenezas?" — Alproksimiĝis viro, tiel rapide kiel liaj maljunaj kruroj permesis al li. Li lamiis kaj portis rastilon sur la ŝultro.

— "Pardonu, sinjoro," balbutis Paŭlo, iom surprizite de l'tuja sukceso de sia ruĝo. "Sed mi devas transdoni ĉi tiun paketon al S-ro Vandekam kaj atendi lian respondon. La afero urĝas." — Li eksplikis, daŭre interrompita de la bojantaj hundoj. La ĝardenisto kapskuis. — "Momenton. bubo," li diris, "mi unue alligos la hundojn; poste ni vidos." Kaj li malaperis kun ili. — Post kiam li revenis, Paŭlo reeksplikis, provante konvinki la verŝajne duonsurdan ĝardeniston ke la afero urĝas kaj gravas. — "Oni jam telefonis al S-ro Vandekam, vi sciu. Oni interkonsentis. Mi devas havi la respondon. La Profesoro volas respondon, tuj, ĉu vi komprenas? Ĉu vi konas Profesoron Martin? — Ne? — Domage! Li estas fama, klera saĝulo. Li loĝas apud ni kaj komisiis min. Ĉar li bezonas respondon senprokraste."

— "Mum, mum," grumblis nekredeme la ĝardenisto. "Mi ne scias. Ni vidos. Sed donu vian paketon kaj venu kun mi."

Larĝa, ŝtonetaĵa vojo ĉirkaŭis la parkon kaj

kondukis al orflava vilao, brileganta en la sunlumo. Blondbukla knabino kun nudaj ŝultroj kliniĝis el fenestro, scivola pro la nekutima vizito. Sed li ne povis bone rigardi ŝin, ĉar la ĝardenisto mansignis al li, irante al malantaŭa parto de la vilao. Ili supreniris terason. — "Atendu min ĉi tie," ordonis la ĝardenisto, montrante kanan seĝon kaj li malaperis tra duonmalfermita pordo.

Laca eksidis Paŭlo sur kanan brakseĝeton. Antaŭ liaj okuloj etendiĝis ebena razeno antaŭ fono de abunde floranta fruktarbaro. Ridetante li pensis pri la ĉarmulino en la fenestrokadro. Ŝi rememorigis lin pri Helga, kvankam ŝi ŝajnis iom pli brutala, voluptama. Li fermis la okulojn kaj lia spirito forvadis inter la sennombraj eblaĵoj de libera posttagmezo kun Helga. Sed li unue plenumu la komision.

— "Sinjoro Vandekam jam foriris," diris la reveninta ĝardenisto gravmiene. "Li estas multe okupita. Sed la Fraŭlino ekzamenos la paperojn kaj respondos. Ĉu vi komprenas? — Intertempe, vi povas iomete promeni en la ĝardeno. Sed ne iru tro malproksimen. Kaj ne malkvietigu la hundojn."

Bone, bone! Paŭlo ekstaris. Ĉu S-ro Vandekam mem, ĉu la Fraŭlino, egale! Se li nur havas respondon, se li nur estas malŝarĝita de sia respondecado kaj povos libere ĝui de printempa libertago! Li malsupreniris la terason, promenis tra flortaj bedoj, enflaris ebriigantajn odorojn kaj reve forflugis kun Helga al plej altaj arbosuproj kaj pli malproksimen al iu malpreciza bieno kaŝita inter preterdrivantaj nubetaroj. Kiom longe li vagadis, li ne sciis; eble unu horon, eble malpli, eble pli, nur tiom longe ĝis hela kaj tre reala voĉo abrupte diskrevigis liajn blujajn esperojn kiel vulgaraĵajn sapvezikojn.

— "Hej, knabo, knabo, kie vi estas? Venu tuj! Halo-o-o!" ĝi kriis. Vere ĉarmega, loganta virina voĉo ĝi estis kaj senpripense li rekte ekkuregis al ĝi. Bedaŭrinde, post kelkaj metroj, unu arboradiko, malice eliĝinte la teron, baris la vojeton kaj perfide kaptis lian piedon. Li faletis, perdis la ekvilibron.... kaj falis. Akra doloro tratranĉis lian dekstran kruron kaj dum momento li senkonsciiĝis. Sed altrudema, interna voĉo agitis lin: "Ekstaru, Paŭlo, ekstaru tuj. Hontu, faleti kiel bebo! Ŝi rigardas vin.... Kion ŝi opinias pri vi?" — Efektive la blondbuklino staris antaŭ li, kompatema ŝi etendis siajn manojn por helpi lin, sed kvazaŭ ne rimarkinte ŝian geston, li streĉis ĉiujn fortojn kaj leviĝis, penante malgraŭ ĉio rideti al

ŝi. Sed li nur sukcesis fari aĉan simian grimacon.

— "Ne gravas, fraŭlino," li diris. "Estas nenio."

— "Ĉu vere?" ŝi dubis. "Ĉu vi ne dolorigis vin?"

Rekte ŝi rigardis en liajn okulojn. Li palpebrumis kontraŭ la sunradioj kaj senpolvigis la pantalonon. — "Ĉu vi havas la respondon por Profesoro Martin, fraŭlino?" li petis.

— "Domaĝe ne," ŝi diris. "Mi ne scias kion respondi. Mi trafolumis la raporton, sed ĝi estas tro komplikita afero por ke mi decidu. Jen via paketo. Kaj aŭskultu! Vi portu ĝin posttagmeze je la dua al mia patro. Li estos en siaj kontoroj de l' A.Z.-oficejo, 7-a etaĝo. Jen enirbileto, kiun mi skribis por vi."

Ho, maldolĉa realo kaŝita en dolĉa, petola voĉo! Sangis lia koro kvazaŭ traborita per feraj sagoj. Li alprenis la paketon, pezan kiel ŝtonego. Malrapide li lamis hejmen; ne nur doloris liaj kruroj, sed frostis en lia animo post la plena seniluziiĝo de liaj esperoj. Tago perdita, eble feliĉo perdita. Nebule griza iĝis la mondo, li eĉ ne plu rimarkis la radiantan sunon nek la helridajn knabinojn, kiuj ĝojkantante kun jupoj flirtantaj kiel flagetoj, eliris la urbon, ek al arbaroj kaj malproksimaj parkoj... Sen li, sen li! Paŝon post paŝo li ŝtoniĝis kiel la enpakiĝinta ŝtona saĝo, kiun li kunportis kvazaŭ nedisgeblan parton de si.

Hejme! — La patrino, iom nerva pro troaj familiaj zorgoj kaj ekvidinte la paketon, tuj komencis riproĉi lin. — "Vi ankoraŭ ne plenumis la komision! Ho, mizerulo, kaj la Profesoro atendas! Kion mi diros, se oni demandos al mi?" — Jes, tiel ŝi plendis, kvazaŭ kulpus li, kaj nè S-ro Vandekam, kiu malgraŭ sia promeso ne estis hejme, kaj nè la Fraŭlino, kiu ne sciis kion respondi! Lin naŭzis. La diablo prenu ilin, ĉiujn. Ĉagrenita li tagmanĝis, dum Raf kaj Robi tamburadis sur la paketon. Se ili povus frakasi ĝin! — — — Li tamen sukcesis ŝtele forlasi la domon kaj dum kelkaj minutoj interparoli kun Helga. Konvinkante ŝin pri la graveco de la misio, li ankaŭ mem iom rekonvinkiĝis. Ili interkonsentis, ke ŝi akompanos lin al A-Z-oficejo kaj atendos tie; poste ili iros al parko. Tiu sukceso mildigis la matenajn sortobatojn kaj kuraĝe li ree ekkurieris.

Efektive, de la dua ĝis la kvara, Helga atendis lin sur la skvaro antaŭ la A.-Z.-oficejo. Vane! Paŭlo ne eliris. Tedita, ŝi tiam foriris. Je la sesa, svarmoj da oficistoj eksterenkuris al tramoj kaj trajnoj, rekondukantaj ilin hejmen. — Finfine, kvaronon post la sepa, kiam la skvaro estis preskaŭ dezerta, la pordo ree malfermiĝis kaj Paŭlo stumblis sur la trotuaron. Li kvazaŭ ŝanceliĝis pro la aerpremo kaj tiam, senĝene kaj malbonmaniera, kraĉis. Kaj ree kraĉis. Poste li eksidis sur benkon en la ĝardeneto, antaŭ ŝprucetanta fontano, kaj singultis. — Bestaĉoj, jes bestaĉoj ili estas, ĉiuj!

Ho, komenĉiĝis bone! Precize je la dua li eniris la imponan kontoraron. La enirbileto de F-ino

Vandekam faris miraklojn. Grava persono ankaŭ ŝi devas esti! Oni tuj metis lin en lifto kaj sen obstakloj li atingis la sepan etaĝon. Senprokraste ĉambrogardisto transprenis la paketon kaj petis, ke li iom atendu en la atendejo. Tie li sidis sur mola brakseĝo kaj studis la vastajn, abstraktajn pentraĵojn, kiuj kovris la murojn. Alvenis kaj foriris multaj aliaj vizitantoj. — Ĉu ne ankoraŭ venas mia vico? li iom post iom nerviĝis. Li sidis kvazaŭ sur flamantaj karboj. Ekde la kvara li ĉiun horon demandis al la ĉambrogardisto, ĉu S-ro Vandekam ankoraŭ ne pretigis respondon? Ĉu oni ne povas peti al li? Urgas ja la afero kaj la Profesoro atendas." — La trian fojon la ĉambrogardisto severe rigardaĉis lin. — "Aŭskultu, bubo! Se S-ro Ĝenerala Direktoro ankoraŭ ne respondis, signifas ke ankoraŭ ne oportunas la respondo. Do la Profesoro kaj vi paciencu!" — Malagrabla kaj dolore Paŭlo konsciis, ke nun vere estas fuŝita lia tuta tago. Ne, Helga ne atendos tiom longe! Treniĝis la horoj, kaj la molaj kusenoj sub li iĝis malmolaj kiel roko. Fine, je la sepa, post kiam la lasta vizitanto krom li jam longe foriris, la ĉambrogardisto venis al li, iom ĝena kaj kun zorgoplena mieno.

— "Nu, knabo," li diris, "mi petas pardonon. Mi ĵus estis ĉe S-ro Ĝenerala Direktoro. Mi ne scias kiel eblas, sed oni tute forgesis pri via ĉeesto ĉi tie, jes, oni forgesis ke iu atendas respondon. Ĉar aŭskultu, je la tria Profesoro Martin mortis. Povra viro! Mi bone konas lin. Antaŭe, li ofte venis kiel vi, atendis en ĉi tiu atendejo. Tute ĝentile, jes, kvazaŭ amikoj ni interparolis. Honesta, purvirta homo! Sed ni ĉiuj iam mortos. — — — Mi nur volas diri al vi, ke nun ne plu gravas la respondo, vi komprenu. Eĉ ne plu necesas la raporto, opinias S-ro Ĝenerala Direktoro. Jen via paketo. Redonu ĝin al la familianoj. Kaj rapidu nun. Vi jam tro perdis vian tempon ĉi tie."

— — — Jam krepuskis, kiam Paŭlo eniris la straton, kie li loĝis. Kvazaŭ premante sin al la muroj, li antaŭenŝovis sin kiel ombro en la ombro, por ke Helga ne rimarku lin, se ŝi troviĝus ekstere, por ke li ne devu konfesi al ŝi sian kruelan humiliĝon. Famega kuriero li estas ja! Antaŭ la domo de l' formortinta profesoro la paroĥestro ĵus adiaŭis viron en nigra kostumo. Paŭlo hezitis alproksimiĝi, sed ili ekvidis lin.

— "Jen, Paŭlo," diris la paroĥestro, "ĉu vi serĉas nin?"

— "Jes," li flustris, kvazaŭ forglutante ion malgajan, "mi redonu ĉi tiun paketon. Estas raporto... de S-ro Profesoro. Oni ne plu volis ĝin."

— "Mi scias," diris la viro en nigra kostumo, alprenante la paketon. "Tre domaĝe! Mi mem telefonis ilin. Sed kion ni povas, se ili ne volas? Balanciĝas la mondo inter nia bonvolo kaj ilia ĉiopovo. Bedaŭrinde, mi ripetas. Lia genia raporto, la vivocelo, plena de profundaj pensoj kaj matura saĝo. "Ideoj pri rehumanismiĝonta Mondo"!

Iom komplikita titolo, mi konsentas..... Tamen, por la bono de la strebanta homaro.... Nu, je lia honoro oni postmorte povas publikigi ĝin. Ĝis duono de la eldonkostoj subvencios la A.Z.-trusto. Sed vi ja scias, kiom valoras.... Pardonu.... La viva, homa voĉa, mi volas diri, mankos...."

— "Certe," kapskuis la paroĥestro, "mi komprenas."

— "Ĉu vi ne volas okupi vin pri ĝi?" petis la viro kaj li jam transdonis la paketon. "Vi spertis multe pli multe ol mi pri konservado kaj prizorgo ĉiaspecaj. Kaj precipe pri saĝo. Ĉe vi, ĝi estas en plej bonaj manoj."

— "Bone," ridetis la paroĥestro subtile. "Mi konas viajn materiajn zorgojn. Ne maltrankviliĝu pro la saĝo kaj dormu pacan dormon. Mi komprenas".

Sed Paŭlo NE komprenis. Vere, li nenion plu komprenis. Granda farso la vivo estis, plena de malicaj farsuloj kaj kelkaj stultaj kapoj, kiel ekzemple li. Kaj la Profesoro. Vidu nur. Fierega kaj memkonscia kiel altmoda kavaliro li tutan tagon trakuris la urbon kun paketo da saĝo de iu duonmorta kaj jam forgesita profesoro. Kaj kiom valoras tiu saĝo, por kio ĝi necesas, kiu volas ĝin? Demandu, jes, demandu al tiu nevidebla, grand-sinjora Vandekam, kiu regas la mondon ekde sia sepa-etaĝa kontoro en la A.Z.-oficejo kaj al kiu ĝi estis destinita, por ke li decidu! "Oni tute forgesis pri via ĉeesto!" jen lia respondo. Ĉar ne nur lin, povran bubon, ili forgesis. Brutale ili flankenŝovas la komisiiton kune kun la komizio, kune kun la Profesoro, kune kun la saĝo kaj kune kun ĉiuj homoj, kiuj hazarde ne oportunas por iliaj oportunismaj celoj.

Furiozis, tempestis en Paŭlo. En sia kolero kaj ĉagreno, li estus frakasinta domojn kaj konstruojn, kune kun ĉiuj Vandekamoj, kiuj regas en ili, kaj kune kun ĉiuj homoj, kiuj teruritaj tremas sub ili. Jen, tion li farus, se li nur estus sufiĉe fortega.

Sed tiam, subite, kiam li jam metis piedon sur la sojlon de la gepatra domo, la Granda Vero rivelis sin al li, tragrimacante la palan lunon en la alta ĉielo. — "Feliĉe do," ĝi mokis, "ke saĝuloj estas malfortaj kaj mallertaj! Ĉu estus tiel oportune, ke pereu la mondo, frakasita de iu, aŭ alia ĉagrenita saĝulo? Mi ne kredas ĝin!" — Li ekhaltis, enpensigante. Tra la fermita pordo li aŭdis kiel lia kanario en la familia ĉambro ekkantis sian lastan vesperan kanton. Kaj en lia koro vekigis la memore de malnova populario:

kantu saĝulo pri saĝo
kiel kanario en kaĝo
ĉar kiujn aŭ kiom li ravas
ĉu multajn, malmultajn
por kanto aŭ saĝo ne gravas.

Tute melankolia li iĝis kaj tremetante pro iu vespera malvarmo, li eniris la domon.

— "Morgaŭ estos ree labortago; mi ne havas apetiton kaj tuj enlitiĝos." li ankoraŭ pensis.

De la Redakcio

Reprenante en miajn manojn post pli ol dujara intermito la redaktadon de nia oficiala revuo, mi sentas strangan miksaĵon de ĝojo kaj timo. De ĝojo, ĉar la laboro, kvankam ne malgranda, kontribuas al la progresado de nia afero, kiu, kiel al vi tiel ankaŭ al mi, montriĝas afero granda kaj fundamente grava por la estanteco kaj estonteco de la homaro. De timo, ĉar la laboro estas malfacila, kaj la deziro plaĉi al ĉiu je ĉiuj tempoj certe estas neatingebla, la ambicio neniam fari erarojn: same, aŭ eĉ pli. Kiel ĉiam, mi faros laŭ miaj modestaj kapabloj.....

Salutante la samideanajn legantojn, mi volas ankaŭ saluti kun kora dankesprimado s-inon Zacho, kiu tiel bone redaktis la gazeton en malfacilaj kondiĉoj, kaj kiu nun malsaniĝis. Mi scias, ke ĉiuj el ni deziras al ŝi rapidan resaniĝon. Mi kaptas la okazon danki ankaŭ al f-ino Vermaas kaj al d-ro Lapenna, kiuj pro la abrupta serioziĝo de mia malsano devis siatempe streĉe barakti por normale aperigi la gazeton tuj post mia elfalo el la vicoj.

"Perfekta" Esperanto

Sur la dua kovrilpaĝo de ĉiu numero aperas kelkaj reguloj pri la manuskriptoj sendotaj por nia revuo. Kiam mi unue redaktis tiun regularon antaŭ unu-du jaroj, la vortoj "perfekta Esperanto" inspiris kelkajn bonhumorulojn inter miaj korespondantoj! Nu, ankaŭ mi ŝatas ŝercojn, kaj mi ridis tiam; kaj tamen, ne estas tute ŝerce, ĉu ne? Ĉu vi scias, ke malklare tajpitaj manuskriptoj senteble altigas la kostojn de la presado? — ĉar la kompostisto ne povas legi ilin, li faras erarojn, kiujn poste oni devas korekti kaj rekompostigi? Manuskriptojn en malperfekta Esperanto la redaktoro devas plume korekti, kaj nenies skribmaniero estas ĉiam tute senmakula, precipe se la skribanto rapidas pro inundantaj taskoj! Niaj kompostistoj estas lertaj fakuloj, kaj nia sperto pruvis, ke bone kaj klare pretigitajn manuskriptojn ili kompostas preskaŭ senerare.....

Do, en tiu ĉi rekomenca momento mi tre petas, ke la kunlaborantoj efektive zorgu liveri al ni klarajn kaj senmakulajn tekstojn! Legu atente la kelkajn regulojn sur la dua kovrilpaĝo. Kaj antaŭdankon!

Rapida ampleksa informado

Unu el la gravaj taskoj de nia revuo, laŭ mia koncepto, estas informadi la legantojn pri la gravaj venkoj kaj okazaĵoj sur nia tutmonda kamparo. Sed la plenumon, almenaŭ la taŭgan plenumon, de tiu tasko baras la neinformateco de la redakcio mem. Kelkfoje ni hazarde sciigas multajn monatojn poste pri iu interesa novaĵo; certe ni neniam aŭdas pri tre multaj aliaj.

Mi urĝe petas ĉiujn aranĝantojn, sekretariojn, unuopajn samideanojn tuj kaj senprokraste informi nian redakcion pri ĉiuj okazintaĵoj en la esperantista mondo, kiuj povas interesi kaj instigi aliajn samideanojn. Oni ne forgesu, ke la pretigado de unuopa numero de la revuo finiĝas (el redakta vidpunkto) precize unu monaton antaŭ la aperdato; pro tiu intermito, bedaŭrinde necesa, la sendado de materialo estas afero unuavice *urĝa*, se la novaĵoj ne estu "malvarmaj" antaŭ ol la legantoj sciigu pri ili. Denove mi vin kore antaŭdankas.

Redakcia adreso

Mi tre petas la legantojn jam nun noti la novan redakcian adreson. Ŝparu penon al s-ino Zacho, ne sendante al ŝi kontribuadojn, kiujn ŝi nur devos poste transsendi al mi.

W. Auld

CED

**Centro de Esploro
kaj Dokumentado**

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo
Telefono ARNold 90-81

CED KAJ LA ZAMENHOF-JARO

Kiel konate, la Zamenhof-Jaro estis planita por 1959 kaj efektive en tiu jaro okazis celebrado en diversaj formoj ĉie tra la mondo. En tiu tuta agado CED plenumis vere elstaran rolon laŭ la Baza Programo. Ĝiaj kunlaborantoj verkis konsiderindan nombron da studoj kaj artikoloj, kiuj aperis ne nur en la Internacia Lingvo, sed ankaŭ en multaj naciaj. Dank' al CED kaj ĝiaj kunlaborantoj estis kolektitaj novaj materialoj pri la vivo kaj verko de Zamenhof. La altnivelaj publikaĵoj altiris la atenton de multaj gravaj internaciaj kaj naciaj instancoj. La krono de la jaro 1959 estis la decido de UNESKO de la 25-a de novembro celebri D-ron L. L. Zamenhof kiel unu el la grandaj personecoj de la homaro en 1960. Tiu decido signifis la plilongigon de la celebrado.

Intertempe, ĉefe kun la deziro helpi al ĉiuj, kiuj utiligos la menciitan decidon de la Plenuma Komitato de UNESKO, CED eldonis luksan grandformatan verkon sub la titolo Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro. Ĉiuj ĝisnunaj recenzoj pri la verko estas plenaj de laŭdoj kaj akcentas ĝian eksterordinaran valoron. La Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro estas la lasta kontribuo de CED al tiu granda omaĝo de la kultura mondo al la memoro de D-ro L. L. Zamenhof okaze de la 100-jara datreveno de lia naskiĝo.

BRILAJ EĤOJ DE LA DECIDO DE UNESKO

Utiligante la decidon de UNESKO, ke D-ro Zamenhof estu celebrata kiel unu el la grandaj personecoj de la homaro, kaj agante laŭ la sugestoj de UEA pri tiu afero, unue s-ro Vilho Setälä el Finnlando sukcesis atingi, ke en la finnaj lernejoj okazu prelegoj pri Zamenhof kaj Esperanto. Tiuj prelegoj okazis en ĉiuj finnaj lernejoj laŭ la instrukcioj de la kompetentaj edukaj instancoj kaj surbaze de materialoj pri Zamenhof oficiale liveritaj de tiuj instancoj. Tuj poste venis la ĝojiga informo, ke ankaŭ en Jugoslavio en ĉiuj lernejoj estos festata la 100-jara datreveno laŭ la instrukcioj de la tieaj kompetentaj edukaj instancoj. La saman rezulton atingis ankaŭ Norvega Esperantista Ligo: la Departemento pri Instruado, al kiu estis liverita sufiĉa kvanto da norveglingvaj broŝuroj pri Zamenhof, decidis elsendi la materialon kune kun aparta cirkulero al ĉiuj mezgradaj kaj instruistaj lernejoj. Plue, la organo de la Norvega Instruista Asocio presigis komplete la saman materialon, tiel ke estis atingitaj ankaŭ la elementaj lernejoj. En Danlando la

Dana Radio en la elsendo por la lernejoj disaŭdigis programojn pri Zamenhof kaj lia verko la 29-an kaj 30-an de novembro. Estas necese aldoni, ke jam en la pasinta jaro, laŭ la direktivoj de la Ministerio de Edukado, en ĉiuj italaj lernejoj okazis prelegoj pri la aŭtoro de la Internacia Lingvo.

Tiuj ĉi bonegaj sukcesoj en la menciitaj landoj signifas, ke dekmiloj da gelernantoj havis la okazon aŭdi seriozajn kaj objektivajn informojn pri D-ro L. L. Zamenhof, unu el la plej grandaj personecoj de la homaro, kiun ankaŭ UNESKO rekonis kiel tian.

MEZA PARTOPRENO EN LA UNIVERSALAJ KONGRESOJ

Jen resumo de interesa statistiko, kiun faris la kunlaboranto de CED s-ro G. C. Fighiera, pri la meza nombro de kongresanoj. En la periodo 1905-1915 okazis 11 kongresoj kaj la meza nombro de kongresanoj estis 1.315. Inter 1920-1939 okazis 20 kongresoj kaj la meza nombro de kongresanoj estis 1.506. Inter 1947-1960 okazis 14 kongresoj, kiujn meze partoprenis 1.951 kongresanoj. La statistiko montras konstantan tendencon al kreskado de la nombro de kongresanoj.

CED-DOKUMENTOJ EN SVEDAJ UNIVERSITATOJ KAJ INSTITUTOJ

Laŭ la peto de Sveda Esperanto-Federacio, kiu liveris la adresojn kaj pagis la kostojn, CED nun sendas ĉiujn siajn dokumentojn al 42 universitatoj, universitataj institutoj, fakultatoj, sciencaj institucioj de Svedujo. Tiamaniere la nombro de la regulaj ricevantoj de la dokumentoj de CED denove grandiĝis, kio signifas ke pli da institucioj havas la eblecon ricevi objektivajn informojn pri la Internacia Lingvo.

CED atentigas, ke ĝiaj dokumentoj estas regule sendataj al tre granda nombro da internaciaj organizaĵoj, institucioj kaj institutoj. Se iu landa asocio deziras imiti ekzemplon de SEF, estas necese liveri al la C.O. de UEA (kiu prizorgas la ekspedadon de la dokumentoj) liston de institucioj kun precizaj adresoj kaj ankaŭ pagi la efektivajn kostojn.

DONACOJ AL CED

	£	\$	p
La stato je la 10-a de novembro 1960	99-	0-	1
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10-	4	
S-ro W. Baaten, Nederlando	5-	8	
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10-	4	
S-ro D-ro Hamvai, Novzelando	9-	5	
S-ro P. Hendriks, Nederlando	18-	11	
S-ro P. Bouvier, Svislando	2-	1-	1
La stato je la 28-a de nov. 1960	103-	15-	10

Koran dankon al ĉiuj donacintoj. Donacojn por CED akceptas la C.O. de UEA, ĉiuj ĉefdelegitoj kaj perantoj, aŭ rekte la Oficejo de CED je la nomo de ĝia direktoro.

APO SUR DU KONTINENTOJ

Ni povas informi la legantaron kiu interesiĝas pri la laboro de APO, la "pionira" sekcio de UEA, ke tiu ĉi ankoraŭ malgranda institucio dum 1960 etendis sian laborkampon al du kontinentoj: Azio kaj Afriko. Ankaŭ la nombro de ĝiaj kunlaborantoj kreskis.

Maroko. Laŭ invito de la marokaj esperantistoj, precipe de s-ro Charles Thollet el Kenitra, mi vojaĝis al Maroko komence de oktobro 1960. Samtempe alvenis tien ankaŭ la plej malnova kunlaborantino de APO, f-ino Elsie Parson.

En la ĉefurbo Rabat mi faris du franclingvajn

prelegojn pri Esperanto, unu en la Universitata urbo, kaj la alian en la Fakultato de sciencoj. Al tiu ĉi lasta ĉeestis s-ro Mohamed el Fasi, rektoro de la universitatoj de Maroko. Ĉeestis 140 personoj. Sekve de tiuj prelegoj du kursoj estis starigitaj kun ĉ. 50 lernantoj. Ambaŭ estas gvidataj de f-ino Parson.

La sama instruistino vojaĝas dufoje ĉiusemajne al Kenitra, por gvidi porkomencantan kaj daŭrigan kursojn. Krom tio s-ro Thollet kaj s-ino Moutet gvidas du aliajn kursojn en Kenitra.

Dum mia restado en Maroko en tri ministrejoj kaj en la universitato mi parolis pri Esperanto kun pluraj altranguloj.

Hindujo. S-ino M. Haudebine jam dum du jaroj laboras diligente en Delhi. El la pluraj jam gviditaj kursoj restis grupeto da esperantistoj, al kiuj ŝi nun gvidas perfektigan kurson. Krom tio, ŝus komenciĝis nova elementa kurso en Nova Delhi, kaj s-ino Haudebine instruas ankaŭ private familion el ses personoj, inter kiuj kvar estas instruistoj. Nia kunlaborantino anoncas, ke nun ŝi trovis bonan helpanton, kiu eventuale povos daŭrigi la laboron post ŝia foriro el Hindujo.

Nepalo. La sekretario de la Esperanto-societo de Katmanduo, s-ro Baikuntha M. Maskey, dufoje skribis al UEA petante kursgvidanton, ĉar se tia ne alvenos baldaŭ, la tuta jam farita laboro pereos.

Post enketo aperis taŭga homo, S-ro Simo Milojeviĉ el Beogrado, lastjara studento. Li estas esperantisto nur dum kvar jaroj, sed jam gvidis 15 Ĉe-metodajn kursojn, estis sekretario de la Zemuna societo, de la Jugoslavia Junulara Organizo, de la Serbia E.-Instituto, kaj cetere tre aktiva kaj kapabla esperantisto. Li konsentis esti nia kunlaboranto dum unu jaro, kiun li pasigos en Katmanduo kaj eble du urboj de Hindujo.

S-ro Milojeviĉ komencos sian laboron dum la unuaj tagoj de 1961.

Rimedo. Kiel mi jam diris en antaŭaj okazoj, ni bezonas pli da kompetentaj esperantistoj, por disvastigi la Internacian Lingvon en la landoj de Azio kaj Afriko. La teritorio estas grandega, kaj la Internacia lingvo estas ĉie egale bezonata.

Tamen, niaj rimedoj estas ege limigitaj. Tial, niaj kunlaborantoj ricevas nur la vojaĝelspezojn (kiam necese), kaj etan subvencion. Do, ili mem devas zorgi pri sia vivtenado.

Nia buĝeto konsistas el la 200 pundoj, kiujn ĉijare UEA asignis al APO, kaj la sumoj donacataj de bonvolemaj esperantistoj, kiuj aprezas nian agadon, kaj al kiuj mi ĉi tie esprimas mian koran dankon.

Mi ne volas preterlasi la mencion de la laboro de s-ro Peter Zacho, kiu kolektas uzitajn poŝtmarkojn de donacantoj, ordigas ilin kaj vendas favore al nia organizo. Belajn sumojn li jam havigis al ni. Al ĉiuj sendintoj kaj al s-ro Peter Zacho (Randbølvej 4, København, Danlando) nian elkoran dankon.

Ankaŭ aliaj eblecoj ekzistas por helpi nian laboron. S-ro Charles Thollet proponis, ke ni starigu dum la Kongresoj vendejon de memoraĵoj el la kongreslando kaj el aliaj landoj. Li mem estas preta kontribui ĉiujare per kvanto de etaj ledlaboraĵoj, kaj eventuale de arĝentaj juveletoj el Maroko. Aliaj eble imitos lin.

Sed por realigi tion, ni bezonas unu aŭ du oferemajn amikojn, kiuj pretos oferi al ni parton de siaj kongrestagoj por organizi tiun vendadon. Kandidatoj bonvolu skribi aŭ al mi aŭ al s-ro Thollet (64, rue des Ecoles, Kenitra, Maroko).

T. Sekelj

18 Sciencaj verkoj kaj resumoj en Esperanto

La nomo de Prof. D-ro Boža Popović estas jam bone konata ne sole en neesperantistaj fakaj rondoj, sed ankaŭ en la esperantistaj: li estas ĝenerala sekretario de ISAE. Tamen pro lia modesteco kaj nia neglektemo la tuta vico de liaj sukcesoj en Esperanto restis nekonataj al la esperantista publiko. Temas pri liaj sciencaj verkoj verkitaj en Esperanto kaj aliaj kun resume en la Internacia Lingvo. Ekde la jaro 1956 li konstante verkas kaj aperigas sciencaĵojn en Esperanto, kaj kelkfoje devas eĉ batali kun la obstinaj redakcioj de fakaj revuoj, kiuj preferas iun alian lingvon ol Esp.-on kaj rifuzas publikigi la verkaĵon en Esp.-o.

En la bibliografio de sciencaj verkoj de Prof. D-ro B. Popović troviĝas 29 verkoj. El tiuj, 13 estas verkitaj

plene en Esperanto kaj 5 havas resumojn en Esperanto. Pro la multnombro de la verkoj ne estas eble citi titolojn de ĉiuj verkoj. Jen kelkaj: Specialperturboj de vektoraj elementoj de planedtorbito; Vektoraj elementoj de elipsa moviĝo de dukorpa mascentro ĉirkaŭ tria korpo; Keplerleĝoj por la orbita planedmoviĝo; Pri avantaĝoj de Gibbs-aj super Gauss-aj esprimoj por la triangulrilatoj en planedtorbitoj; Kalkulado de planed- kaj kometefemeridoj senpere el iliaj pozicio kaj rapido, ktp. La temoj pri traktitaj estas el kampo de astronomio. Jam el la titoloj respeguliĝas tre laŭdinda inventemo de la aŭtoro en kreado kaj kombino de fakterminoj.

Ni memorigas, ke resumojn en Esperanto aperigis ĝis nun en Jugoslavio en siaj verk(et)oj ankaŭ Lic. Marinko Gjivoje (en fakoj: arkeologio, bibliografio, historio, speleologio) kaj Prof. D-ro Oton Pancer (fako: agromonio), kaj ni deziras per ĉi tio kura-

ĝigi kaj instigi ankaŭ aliajn scienlistojn provi fari la samon. Prof. D-ro B. Popović akceptu gratulon pro sia abunda kaj pionira laboro sur scienca kampo! (Laŭ informoj en Jugoslavia Esperantisto).

La Estraro gratulas

La Ĝenerala Sekretario de TEJO, Nicola Minnaja, lastatempe doktoriĝis "*Summa cum laude*" en la aĝo de 22 jaroj. D-ro Minnaja, kiu interalie estas ankaŭ Komitatano de UEA, estas denaska esperantisto, kaj plurfoje premiigis en niaj Oratoraj Konkursoj.

Ni deziras en la nomo de ĉiuj membroj de nia Asocio esprimi al D-ro Minnaja koran kaj varman gratulon.

La Estraro

Novaj Libroj

Duope ricevitaĵn ni recenzas; unuope ricevitaĵn ni nur mencias.

*) ricevebla ĉe U.E.A.

Eli Urbanová: NUR TRI KOLO-ROJN*. Prezento de Julio Baghy. Ilustraĵoj de Karel Oberthor. Stafeto, Beletraj Kajeroj, n-ro 3. Eld. J. Régulo, La Laguna, Tenerifo, Kanariaj Insuloj, 1960. 140p. 22 x 19 cm. Prezo: 1 usona dolaro.

John Francis: VITRALO* Prezento de Ferenc Szilágyi. Stafeto, Beletraj Kajeroj, n-ro 4. Eld. J. Régulo, La Laguna, 1960. 136p. 22 x 19 cm. Prezo: 1,20 usonaj dolaroj.

Edmond Privat: JUNAGA VERKARO*. Prologoj de Julio Baghy kaj Kolomano Kalocsay. Stafeto, Beletraj kajeroj, n-ro 5. Eld. J. Régulo, La Laguna, 1960. 144p. 22 x 19. Prezo: 1,20 usonaj dolaroj.

Jen tri novaj kajeroj en la konata beletra serio de Stafeto: unu poezia, unu proza, kaj unu samtempe proza, poezia kaj drama. Ĉiuj tri tenas plej alte la jam honoran standardon de tiu kanariinsula fama eldonejo. Efektive, malgraŭ la ne tute malsimpatia ciniko de nia tre lerta kritikistino s-ino Conterno, estas fakto, ke nuntempe la granda plimulto de libroj aperantaj en Esperanto atingas jam nivelon multe super la mezo, nivelon, kiun antaŭ ne tre longe oni ĝojkrie salutis — ĉar malofta — nur ĉe apartaj, unuopaj eldonaĵoj. La persistemo de pioniraj kulturuloj, la senlaca strebado al ĉiam pli altaj kriterioj, nun alportas siajn fruktojn, en formo de eldonaĵoj pri kiuj ni ne nur ne devas pardonpeti, sed ni eĉ rajtas senhonte fieri pri ili. Nun tre maloftaj estas eldonaĵoj, kiuj odoraĉas je amatoreco kaj diletantismo, — kaj ili fariĝu ĉiam pli maloftaj! Kiam mi ekpensas pri niaj libroj aperintaj dum la lastaj du-tri jaroj en Bulgarujo, Ĉinujo, Danlando, Sudameriko k.a. — kaj kompreneble en Kanario — mi pensas pri sinsekvo de verkoj, kiuj, ĉu "popularaj" ĉu "kulturaj", starigas al si kriteriojn de normeco normale akceptatajn ĉe la plej bonaj nacilingvaj eldonejoj. Al tiu sinsekvo aliĝas ankaŭ la nun recenzataj tri volumetoj.

Unue ni havas la unuan poemaron de la konata, plurfoje premiita, ĉeĥa poetino Eli Urbanová. Jam ne temas paroli pri majstreco de formo, estrado de la lingvo: ĉion ĉi oni povas sendiskute supozi ĉe la plimultaj nuntempe aperantaj poemaroj; anstataŭ tio ni rajtas senplue aŭskultadi al la

individa voĉo de la poetino, enprofundiĝi en ŝian verkon por el ĝi ĉerpi la spertojn, kiujn al nia akceptema animo ŝi proponas. Kion ni aŭdas, kian impreson ni ricevas? — impreson de pasio, sentemo kaj sensemo. Jen vivturmentita estaĵo, por kiu la verkado estas ia liberigo kaj malŝarĝo meze de la doloroj, ĉagrenoj kaj problemoj:

*Sed tag' ebria! Forgesitaj devoj.
En mi sin nome akumulis premo.
Sur sof' mi kuŝas,
dronas mi en revoj....
Kaj la rezulto? Ploro aŭ poemo.*

Sufiĉe ordinara speco de mensa lakso? Ĉu la poezio ne ĉiam naskiĝas el iaj turmentoj? Kaj tamen la rezulto valoras por aliaj personoj, nur se la poeto sukcesas universaligi sian sperton, nur se li el ĝi kreas veran artverkon. Tion faras Urbanová. Kiel ĉiam estas la surprize trafe elektitaj esprimoj kaj figuroj, kiuj sentigas al ni ion, kio ĝuste al ni parolas:

*en sonĝo nur
mi tra feliĉa ploro
diradas al vi: Ci!*

(En "Lingvo Stilo Formo" Kalocsay iam prave pruvis, ke por esperantistoj multe pli intima estas la formo *vi* ol la mortnaskita *ci*; kaj tamen jen vidu, kiel la poetino sukcesas enblovi, se nur por momento, la vivon en tiun rigidan vorteton!) Aŭ denove:

*Ja estis peza vino,
kiun ni trinkis kune....*

La kutimo de iuj niaj poetinoj, inkluzive de Urbanová, anime senvestiĝi antaŭ ni (*Curriculum Vitae*, *Disiĝo*, k.a.) starigas interesajn demandojn por poeto, kies kutimo estas ĝuste la inverso, nome vestiĝi en plej diversaj ŝminkaĵoj kaj aliies observitaj kostumoj, kaj devigas nin serĉi teoriajn bazojn por la poezio sur pli larĝa tereno, ol ĝis nun estas ĝenerale farite. Sed la duan kutimon — tiun de alivestiĝo — havas ankaŭ Urbanová. Se en kelkaj partoj de "Nur tri kolorojn" ŝi pasie prezentas pure subjektivajn travivaĵojn: en precipe "Pri mi mem" kaj "Gutoj de intimo"; en aliaj partoj ŝi transkorpigas kiel sorĉistino, princino, k.a., kaj tute precipe en sia sovaĝe kortuŝa, maltrankvilega fantaziaĵo "Hetajro dancas", tiu dekkvinpoema ciklo verkita kva-

zaŭ de antikva (tempe, ne aĝe!) ĉiesulino:

*Kantas mia korp'
nudan kanton tange —
Kisu, kisu min, kun pasi', ĝissange!
Pro volupta trem' mi ebrie svenas
Kaj vi ne venas!*

Tre bonvena estas "Nur tri kolorojn", kaj ĝi donos plezuron al multaj legantoj. Almenaŭ unu leganton ĝi jam multe plezurigis.

Due venas la unua novelkolekto de la jam konata poeto John Francis. Mi volas diri tuj en la komenco, ke tiu ĉi novelaro ŝajnas al mi eble la plej matura proza verko (kompreneble fikcia verko) originala en Esperanto — pretendo, kiu povas utile vekti diskutojn inter la interesatoj, kaj povas ankaŭ malplaĉi al kelkaj, inkluzive kaj ĉefe al John Francis mem. Efektive, la fakto ke mi entute recenzas la verkon malplaĉos al li, kaj li bele regalos min pro tio, ĉar, kiel oni ĝenerale scias, li estas mia amiko, kaj tio (laŭ li) vekos pravajn suspektojn pri la valoro de miaj opinioj. Kiel ajn, mi donas ilin, kaj riskas la sekvaĵon. La noveltradicio en Esperanto estas jam tre forta, kaj ni havas elstarajn novelistojn: Baghy, Szilágyi, Newell k.a. Al ili plenrajte aliĝas Francis kun "Vitrilo". Tute aparte mi rekomendas tiun ĉi volumon ankaŭ al tiuj, kiuj multe helpas la progreson de Esperanto per tradukado de ĝiaj elstaraj verkoj en nacilingvon: jen nepre volumo, kiu meritas vian seriozan atenton!

"Vitrilo" enhavas dek novelojn, kiuj kovras larĝan gamon de temoj kaj humoroj. Kvar el la rakontoj lokiĝas en fantazia Juglando, regno elpensita de Francis mem, kies loĝantoj nur tro homece vivas kaj rolas; sed la fantazieco de la fono ebligas al la aŭtoro mildironian satiremon, neniam sovaĝan, sed ĉiam celtrafan. Tio esprimiĝas kelkfoje oblikve, ĉiam aplombe:

"La miljara paco estis rimarkinda fenomeno en si mem."

Post tiu delikate esprimita ironiaĵo Francis daŭrigas:

"Okazis, ke gravaj instancoj en Juglando kaj ties najbaraj landoj tiom enuis pri senĉesaj militoj kaj militejoj, kiuj portis neniun profiton al iu ajn, ke ili interkonsentis elprovi la teorion, kiu asertas, ke milito aŭtomate eliminiĝos, kiam ĉie virinoj regos anstataŭ viroj, tial, ke virinoj estas molkoraj kaj cetere naskas infanojn. La Komisiono por la Konservado de la Paco, kiun starigis Juglando kaj ĝiaj najbaroj, do rekomendis, ke la membroŝtatoj deputu sole virinojn al siaj ministerioj por eksteraĵaj aferoj, kaj la reprezentataj registaroj senescepte kompleksis. La sekvinta militego konvinkis pri la neceso fari pli drastan demarŝon...."

La nejuglandaj noveloj do estas ses. "La tuŝo de Morto" rakontas dum-

militan travivaĵon de aviadisto, kaj estas rimarkinda pro la sensentimentala realismo de la traktado, kaj pro la flua uzado kaj lerta kreado de fakaj esprimoj kaj parolturnoj. "La vidvino Pirsen" kun indigno kaj kompatemo kortuŝe priskribas la solecegon de maljunulino. "Okazos je la deka" estas iom rutina surpriznovelo. "Ĝermoj en rikolto" estas la granda juvelo de la kolekto, kaj preskaŭ nesuperebla ekzemplo de la novelo kiel artformo. En ĝi renkontiĝas kaj kunfandiĝas realismo kaj simbolismo, en ĝi esprimiĝas la tuta bonkoreco kaj krueleco de la homaro, pere de la agado de kelkaj geknabetoj. Unu post unu la okazaĵoj kreskigas la tension de la atmosfero, ĝis oni atingas la konsternan simbolon, per kiu iel sumiĝas la tuta fatalo de nia malfeliĉa raso:

"...la infano idiota rikanis pri sia potenco, tenante en la mano la sangon pratipon de l' homaro."

La lasta novelo en la kolekto estas io speciala. Ĝi nomiĝas "Kiel kaj kial Jurgen turniris por damo Liza", kaj unufacete ĝi estas brila kompletigo de konata anglalingva satirromano "Jurgen". En sia novelo Francis absolute kaptas kaj al si rekreas la stilon de la originalo, kvazaŭ la novelon verkus en Esperanto la originala romanaŭtoro (J. B. Cabell) mem! Sed kompreneble tiun faceton ĝuos nur tiuj, kiuj jam konas la anglalingvan romanon, kaj se nur tiun valoron havus la novelo, ĝi eble ne meritus lokon en Esperanta libro. Feliĉe, kaj kompreneble, Francis tamen proprigis al Esperanto kaj al si la heroon Jurgen kaj ties megeran edzinon, kaj ili eniras satirmondon rekoneblan de ĉiu esperantisto. Kaj tamen mi scivolas kiom da samideanoj kaptos la esencon de la grandioza fabelo de la Kalvaliro kaj la pigmeoj? Kiom el ili reeĥos la spektintojn en la mirinde potenca eltiraĵo sur la paĝoj 128—129, kiuj respondis:

"Ne, ne, ni ne rigardos, kaj kiel ni povos vidi, se ni ne rigardos?"

Ĉu entute la esperantista mondo estas preta por verkisto tiel matura kiel Francis? Mi esperas, ja mi eĉ kredas, ke jes.

La tria kajero ankaŭ estas, laŭ sia maniero, elstara eldonaĵo. Temas pri verkoj verkitaj antaŭ iaj kvindek jaroj de nia ankoraŭ hodiaŭ viglanta, konata kaj populara D-ro Privat. La volumo konsistas el represo de la verkoj "Pri esperanta literaturo" (1912), "Tra l' silento" (1912) kaj "Ginevra" (1913), kun ses prozaĵoj fikciaj el la sama epoko. D-ro Privat estas unu el tiuj malmultaj esperantistaj verkistoj, kies verkoj aperis daŭre en pluraj eldonoj kaj ofte tradukitaj en diversajn lingvojn; ĉu la nova represo de tiuj junaĝaj verkoj ankaŭ nun utilas? Mi nepre opinias, ke jes. La rolo de Privat en nia movado estis tiel

elstara, lia sinteno al Esperanto tiel klarvida, ke, unue, liaj fruaj verkoj estas iusence pioniraj, kiuj helpis krei nian kulturon hodiaŭan, kaj, due, li tiam solvis problemojn, kiuj eĉ hodiaŭ de tempo al tempo levigas siajn kapojn, kaj multo el tio, kion li diris antaŭ kvindek jaroj, ankoraŭ hodiaŭ estas aktuala, kvankam kelkfoje la situacio supraĵe ŝanĝiĝis. Ni prenu ekzemple lian eseon pri nia literaturo originala. Abundas tie fundamentaj nocioj pri nia afero, pri kiuj estas utile rememorigi. Jen:

"... kiam en lingvo la homoj ne plu tradukas, sed pensas, kaj ne nur pensas, sed sentas kaj enmetas tutan sian koron, tiam estas nepre certa fakto, ke tiu lingvo estas lingvo vivanta."

Aŭ:

"Esperanton ni neniam konsideru, kiel proponatan aferon. Ĉesu tiaj paroloj, kiaj 'se Esperanto sukcesos...' aŭ 'kiam Esperanto estos starigita...' Jam sukcesis Esperanto, ĉar ĝi vivas; jam ĝi estas starigita, ĉar ĝi uziĝas."

Saĝaj vortoj, kiujn oni bone notu!

La ses prozaĵoj estas vere "junaĝaj verkoj", kaj se ili havas la mankojn de tiaj verkoj, ili — kaj pli grave — posedas ankaŭ ties malmankojn; ili estas, nome, amalgamo de sentimento kaj klarvido. Kien foriras en maturo la senŝancela justemoj de junulo? Kial pli maljunaj homoj ne plu kapablas klare distingi inter tio, kio estas bona, kaj tio kio estas malbona, kiel ĝenerale kapablas la junuloj? Ne temas pri harfendaj disputetoj filozofiaj pri dubindaj punktoj, kaj pri la "naturo de la bono", sed pri okulfrapaj maljustaĵoj de neniu defendeblaj. Tion senkompatate draŝas la fervora junulo, sed ĝin (intence?) preteratentas la pliaĝulo. Tiujn ĉi pensojn instigas la noveleto "Rozoj por la sinjorino", nuda (sed ne tute kruda) akuzo al ĉiuj niaj gvidantoj. Tion povus diri nur junulo, kaj tion bele eldiris la junulo Privat.

La du ceteraj partoj de la volumo estas iel historiaj. "Tra l'silento" estis unu el la plej fruaj poemaroj en Esperanto, kiu jam tiam montris poeton senpere kreantan internacilingve kaj propravoĉe. Ankoraŭ hodiaŭ la plimultaj el tiuj poemoj kapablas emociigi la senteman koron:

Vespere l' okuloj el lumo ripozas
Kaj naskas la nokto la mondon

de l' sonoj.

Ekstere la vento tra l' kamp'

furiozas

Kaj ploras sur strat' violonoj.

"Ginevra" estis, se ne la unua, almenaŭ unu el la unuaj originalaj dramoj en nia lingvo; ĝi estis dufoje prezentita en Universalaj Kongresoj; kaj, kvankam ĝi ne posedas grandan potencon, ĝia historia rolo pravigas ĝian nunan represon.

W. Auld

ZAMENHOF*. Ismael Gomes Braga. Eldonoj "Nia Stelo", Rua de Pedrouços, 95—2º, Lisboa, 1959, 66 pagaj + bildo de Zamenhof, 15 × 11. Prezo ne indikita.

Kvankam multobligita, la libreto aspektas agrable, kaj la enhavo tuj interesas. En la antaŭparolo la verkinto diras i.a.: "Anstataŭ paroli pri li, ni atente aŭskultu lin. Ni multon lernos de li anstataŭ instrui pri li." Kaj prave. Ĉiuj ĉapitroj komenciĝas per eldiroj de Z, kiujn la verkinto precize kaj mallonge komentarias. Bonan superrigardon oni havas pri la unua malfacila tempo de Esperanto, kaj per la faritaj komparoj oni sentas kiel facila fakte estas nia laboro nuntempe, kaj kiel malfacilega estis la komenco. Tre rekomendinda libreto.

E. Henning Olsen

KUNFANDIĜO DE REVUOJ

Okazis lastatempe io sufiĉe konata sur nacilingva tereno, sed treege malfacila, se ne unika, sur la internacilingva. Post sia 6a numero, la japana kultura revuo "PROMETEO" malaperis kiel memstara eldonaĵo — pro kaŭzoj bedaŭrinde sufiĉe normalaj en Esperantujo — kaj kunfandiĝas kun la konata jugoslavia revuo "LA SUDA STELO", kiu disponigas spacon al la japanaj kontribuintoj al "Prometeo". Kvankam ni malĝojas, ke devis (almenaŭ provizore) malaperi unu bona revuo, ni gratulas niajn jugoslaviajn samideanojn pro ilia iniciato kaj helpemo, kaj ni salutas bonegan ekzemplon de vere internacia kunlaboro, kies celo, aparte salutinda en la nuna epoko de parta regionismo eĉ en nia movado, estas "plilarĝigi la internacian kadron" de LSS. Ni deziras grandan sukceson al la nova "LA SUDA STELO — PROMETEO".

"La Suda Stelo", kiel konate, estas unu el la plej interesaj, modele redaktitaj kaj antaŭiĝemaj el niaj revuoj. Inter la multaj gravaj kaj atentokaptaj ĝiaj rubrikoj troviĝas jam unu nova, kiu indas apartan mension. Ĝi estas kuranta bibliografio de la gravaj artikoloj kaj literaturaĵoj freŝe aperintaj en la tuta esperantista gazetaro. La unua rubriko enhavas ĉiujn tiajn artikolojn aperintajn dum la unua duono de 1960, kaj registras proksimume 200 titolojn kun iliaj fontoj. Ankaŭ la ĉefaj recenzoj el la periodo estas registritaj. Tiu ĉi rubriko estas valorega por ĉiu serioza esperantisto, kaj se nur por ĝi sola, ĉiu serioza esperantisto devus fariĝi abonanto de "LSS". Aŭ, kiel ĝi nun nomiĝas, "LSS-P".

La Lingva Ĥaoso

"La aspirado, esti informita kiel eble plej precize kaj pri ĉio, movadas nature tunojn da demandiloj, statistikoj kaj raportoj. Ĉiuj — la membroj ja estas Belgujo, Francujo, Germanujo, Italujo, Nederlando kaj Luksemburgo — devas esti tradukitaj en la koncernajn lingvojn kaj krome anglan. Ĉi tio havigis al la organizaĵo la moknomon: Eŭropa Komunaro por Karbo, Ŝtalo kaj papero."

laŭ "Kleine Zeitung", Graz, 19.X.1958.


"Ĉu ekzistas garantio, ke ne eksplodos interbatiĝoj dum la futballudo hodiaŭ vespere? Tute ne. Kaj mi sugestas, ke la ĉefa kaŭzo de la malagrablaĵoj en la plimultaj el la Eŭropaj Pokalludoj estas tio, ke la arbitro ne povas admoni la ludantojn, tute simple ĉar li ne scipovas la lingvojn. Mi povus citi dekojn da ekzemploj, kie arbitroj, kiuj devis estri internaciajn kaj eŭropajn ludojn, ne kapablis paroli eĉ unu vorton de la lingvoj de la kontraŭantaj trupoj. Plej freŝe, ni ekzamenis la faktojn pri la ludo Borussia-Rangers. La jugoslavia arbitro, M. Damania, povis paroli nek la germanan nek la anglan. Kiam la ludo ĥaosigis, li nur ekscitite manvokis iun por helpi. Proksima estis M. Deinst el Svislando kaj li flue parolas la germanan kaj la anglan. La arbitro hodiaŭ vespere, M. Rigato, venas el Italujo. Li iomete scias la francan, sed tute ne la germanan kaj la anglan. Do, dum ni atendadas la solvon de la lingva problemo, ni nur esperu, ke la amika sinteno de Borussia efektive malpliigos la tension."

laŭ "Scottish Daily Mail",
Edinburgo, 30.XI.1960.

(Lingva noto: Tradukante la duan elĉerpaĵon el la angla, la tradukinto lasis la literon M. antaŭ la propraj nomoj. Tiu "M" en la originalo signas la vorton "Monsieur", kiu estas franca vorto signifanta "sinjoron". Anglaj verkistoj havas la kuriozan kutimon nomi ĉiujn fremdulojn "monsieur", tiel ke jen ni trovas ke sviso, jugoslavo kaj italo titoliĝas en angla lingvo per franca titolo!)

KOREKTO

Sur p. 213 de nia decembra numero aperis sub la titolo "Nederlando" informo, ke L.E.E.N. intencas organizi prelegsemajnon similan al tiuj, kiuj jam okazis en Frostavallen. Ni bedaŭras, ke tiu informo, kvankam principe korekta, aperis iom tro frue, ĉar la intenco estas, organizi la semajnon dum 1962. Niaj legantoj estas do petataj, ankoraŭ ne skribi al la donita adreso. Ĝustaj informoj aperos siatempe.



LA JUNA VIVO

Cion por la redakcio de "L. J. V." sendu al:
Ivo Osibov
Sinjskih Žrtava 13/II, Split, Jugoslavio

JE LA NOVJARO

Ni daŭrigu nian laboron per ĉiuj bonaj rimedoj!

Je la komenco de la nova jaro 1961 mi salutas ĉiujn junajn geamikojn en la tuta mondo kaj la amikojn de la Esperanto-Junularo.

Kun bedaŭro ni eksciis, ke la 29-an de oktobro 1960 forpasis nia kara Prof. D-ro Giorgio Canuto, kiu estis granda amiko de la Esperanto-Junularo kaj tion aktive pruvis dum sia agado kiel Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, helpante multe en la renovigo de nia Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Al la edzino kaj la filo mi esprimis nian koran kunsenton. Ni esperu, ke nova Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio montros saman komprenon por la junulara problemo.

En la lasta tempo min ne nur atingis malĝojigaj informoj, sed ankaŭ ĝojigaj; inter ili estis unu, kiu meritas nian specialan atenton: Nia Ĝenerala Sekretario Nicola Minnaja doktoriĝis la 15-an de novembro. Gratulon al li! Estas ĝojige konstati, ke en la lasta jaro la agado de la Esperantista Junularo kreskis, precipe tiu de kelkaj el niaj landaj sekcioj. Dum la Kongreso en Rotterdam la Komitato de TEJO multe diskutis pri la problemoj de nia agado kaj decidis entrepreni novajn paŝojn por la disvastigo de Esperanto speciale inter la neesperantistaj junularaj organizaĵoj. Estis decidite, ke la Estraro de TEJO kunvenos dufoje dum la jaro, nun ankaŭ dum Paska Estrarkunsido, por povi pli bone kunlabori. Same estas menciinde, ke la financa situacio de TEJO pliboniĝis per laŭdindaj decidoj de la Komitato de UEA dum la Kongreso en Bruselo.

Sed se mi skribas tiun novjaran artikolon, mi direktas min speciale al niaj Individuaj Membroj, kiuj estas bedaŭrinde ankoraŭ relative malmultaj.

Ni devas speciale zorgi en ĉi tiu jaro, ke la nombro de Junularaj Delegitoj inter ili kresku konsiderinde. En tiu rilato estas interese por ni, ke la Estraro de UEA decidis starigi specialan fondaĵon sub la nomo "Memoriga Fondaĵo Prof. D-ro Canuto". La celo de tiu fondaĵo estas ebligi al la Esperantistoj de diversaj landoj pagi unu aŭ plurajn kotizojn MJ aŭ MA por Esperantistoj en landoj, el kiuj oni ne povas pagi la kotizon al UEA. Eluzu

ankaŭ vi tiun eblecon por pagi kotizon J-MJ aŭ J-MA por unu el viaj geamikoj el tiaj landoj. Se multaj faras tion, certe ankaŭ poste la reto de Junularaj Delegitoj fortiĝos kaj fariĝos pli universala.

En novjara artikolo mi fakte devus ĉiam ripeti la samajn dezirojn por efika agado, ĉar nia celo restas ĉiam la sama. Mi ne volas fari tion. Mi nur rekomendu, ke ni streĉu ĉiujn niajn fortojn por atingi tiun celon per ĉiuj bonaj rimedoj!

Günther Becker

6-a INTERNACIA JUNULARKUNVENO SUR FELDBERG (NIGRA ARBARO) 30. 3. — 3. 4. 1961

Daŭrigante niajn tradiciajn Paskajn Feldberg-renkontiĝojn ni kore invitas la junajn geesperantistojn en- kaj eksterlandajn, travivi siajn Paskajn feriojn en internacia rondo en kaj ekster la junulargastejo Hebelhof apud la 1500 metrojn alta Feldberg proksime al Titisee, Germanujo. Kiel la plej alta punkto kaj kvazaŭ la koro de la Nigra Arbaro, la Feldberg-regiono estas sporta kaj migrada paradizo.

Same kiel la pasintjaraj, la ĉi-jara renkontiĝo celas praktikan internacian kompreniĝon inter gejunuloj pere de Esperanto, perfektigi en Esperanto per prelegoj, diskutoj kaj abunda konversacio kaj nelaste refreŝiĝon dum ekskursoj per aŭ sen skioj.

La prezo (enhavanta loĝadon kaj ĉiujn manĝojn) estas 25 GM por partoprenantoj malpli ol 20-jaraj kaj 30 GM por pli ol 20-jaraj.

Bonvolu baldaŭ anonci vian partoprenon al la Germana Esperanto-Junularo, T 6/18, Mannheim, Germanujo, kun indikoj pri viaj nomo, antaŭnomo, preciza adreso, naskiĝdato kaj profesio. Limdato por aliĝoj estas la 15-a de marto 1961.

Koran bonvenon sur Feldberg!

Germana Esperanto-Junularo
Federacia Estraro

Tra la Mondo

● **La Oficiala Postkongreso de la 46a U.K.** estos traveturo tra Skotlando, de la 12a ĝis la 19a de aŭgusto. Lokaj esperantistoj aranĝos festvesperojn, en Glasgovo la 13an kaj en Edinburgo la 18an. Frua aliĝo estas konsilinda, ĉar la hotela situacio estas malfacila. Skribu al la L.K.K.

● **Laŭ dekreto de la hungara instruada ministerio**, Esperanto estas instru-ebla en mezlernejoj de tiu lando, kun speciala ministra permeso, kiel eksterordinara fako, kaj oni povas fari ankaŭ ekzamenon. Tiaj okazis jam kelkloke, ekzemple en gimnazio de urbo Gyula, kaj en urbo Szeged eĉ abiturientaj ekzamenoj en du gimnazioj.

● **Laŭ la projektoj, en 1961 oni fondos hungaran Landan Societon**, kiu apartenos al la Landa Sindikata Konsilantaro, kaj eldonos krom monata sciigilo ankaŭ ilustritan kulturan kaj socian revuon. Oni esperas, ke la nova organizo povos pli efike kunlabori kun UEA kaj aliaj esperanto-organizaĵoj, samtempe pli forte kuntenante la landan movadon.

● **Jam de du jaroj la kroatlingva faka gazeto "Vjesnik ZET"** (Heroldo de Zagreba Elektra Tramo) enhavas Esperanto-Anguleton. Tio ĉi estas gratulinda, tamen ni ne povas ne esprimi bedaŭron, ke la redakcio ĝis nun ne inkluzivas mallongajn resumojn pri la kroatlingvaj artikoloj, kio multe vastigus la intereson kaj utilecon de tiu faka revuo.

● **62-paĝa esperantlingva broŝuro** pri la situacio en Sudtirolo, verkita laŭ konsento de la aŭstra Ministerio por Eksteraj Aferoj, estas sendita al ĉiuj Ministroj de Eksteraj Aferoj en la mondo, kiuj estas UNO-membroj, kaj ankaŭ al germanlingvaj gazetoj, membro-delegacioj de UNO en Novjorko, k.a. Interesiĝantoj pri tiu (politika) verketo povas ricevi ĝin de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, kontraŭ ses resp. kup.

● **La Esperanto-Societo en Maribor**, okaze de sia 50-jara jubileo, okazigis ekspozicion inter la 16-a kaj 23-a de oktobro 1960, kiu estis multe vizitita. La loka radio-stacio disaŭdigis favorajn informojn.

● **Zamenhofstrato en Hamburg.** Per dekreto publikigita en la registara bulteno de la Hansa kaj Libera urbo Hamburgo de la 17-a de majo, 1960, la Alta Senato donis al nova strato en urboregiono Wandsbek, kvartalo Farmsen, la nomon **Zamenhofweg**. En la sama bulteno oni klarigis la fonton de la nomo.

● **La 20-an de novembro 1960**, je la 21-a horo, disaŭdiĝis per stacio "Radio-Luxembourg" intervjuo dediĉita al d-ro Zamenhof. Partoprenis f-ino Y. Paulier, s-roj W. King (honora vic-prezidanto de la novzelanda movado),

J. Guillaume, P. Petit, J. Rousseau kaj J. Thierry.

● **Gemeliĝo de la urboj Frankfurt am Main kaj Lyon.** De la 8a ĝis la 15a de oktobro okazis en Frankfurt am Main la german-franca semajno, dum kiu la urboj Lyon kaj Frankfurt ĝemeliĝis. La Esperanto-grupoj de la du urboj partoprenis en la starigo de amikaj rilatoj inter la du urboj, kaj sukcesis kontaktiĝi kun la urbestroj. La urbestro de Lyon, s-ro Louis Pradel, esprimis sin favore al nia lingvo, kaj promesis sian estontan helpon laŭpove.

● **En Mozambiko** la esperanta fako de la "Clube dos Lisboetas" okazigis ekspozicion okaze de la festoj de la 25a datreveno de la klubo inter la 10a kaj 25a de oktobro. Rezulte komenciĝis kurso. Ili ricevis esperantaĵojn el ĉiuj mondpartoj, kaj dankis al la sendintoj per bildkartoj, sed ĉar forbruliĝis kelkaj poŝtvalizoj en la portugala ŝipo "Império", povas esti, ke kelkaj el la senditaj esperantaĵoj detruigis. Al tiuj eblaj sendintoj la klubo deziras esprimi sian sinceran dankon.

● **La Esperanto-Sekcio ĉe la Moskva Domo de Medicinistoj**, konforme al la decido de UNESKO, okazigis vesperon dediĉitan al L. L. Zamenhof. Pri la vivo kaj laboro de Zamenhof prelegis redaktoro de la Granda Soveta Enciklopedio N. F. Danovskij. Aliaj prelegantoj estis D-ro Salnikov kaj I. S. Škapa. Poste okazis literatur-muzika koncerto, en kiu partoprenis inter aliaj artisto de Moskva Teatro de Lenina Komsomolo N. N. Ryjtjkov. En la vestiblo estis aranĝita Esperanta Ekspozicio. La 11an de decembro en la Domo de Medicinistoj okazis simila vespero dediĉita al Zamenhof.

● **Esperanto-tago en la provinco Santa Fe, Argentino.** Laŭ iniciato de niaj samideanoj en Rafaela, la Edukministerio de la provinco Santa Fe decidis fiksi la 15an de septembro de

ĉiu jaro por speciala leciono en la lernejoj pri L. L. Zamenhof kaj Esperanto. La Argentina Esperanto-Ligo disponigis al la Ministerio la didaktikan materialon, kiu estis distribuita inter 1100 lernejoj.

● **Nova faldbroŝuro pri Malmö.** Nova, bela kaj multkolora faldbroŝuro aperis pri la urbo Malmö, Svedujo. Tute novaj plurkoloraj bildoj, granda urbokarto kaj ekskursplano por Skanio, la plej suda sveda provinco. Ricevebla kontraŭ unu respondkupono ĉe Malmö Turisttrafikförening, Malmö, Svedujo. Skribu en Esp., kaj nepre mendu la Esperanto-eldonon.

● **La 31a Nacia Kongreso de Esperanto (Italujo)** en Cortina d'Ampezzo, 10-16 septembro 1960, eldonis belajn dulingvajn, dukolorajn glumarkojn.

● **Geonkloj esperantistaj.** Estas skemo starigita de S-ro Sullivan, Britujo kaj oficiale subtenita de I.L.E.I. en 1958, por helpi al progresintaj lernejoj kaj junuloj, kiuj kapablas skribi Esperanton sendepende, laŭ kiu plenaĝulo akceptas nev(in)on, kun la celo amikiĝi kun tiu, gvidi lin lingve kaj konservi intereson pri Esperanto.

En Januaro, 1959 estis 65 geonkloj kaj 53 genevoj el 20 landoj. En Julio, 1960, kontakto jam estis farita inter 103 geonkloj kaj 164 genevoj el 23 landoj. Kelkaj plenaĝuloj akceptas pli ol unu. El tiuj nombroj 39 geonkloj kaj 109 genevoj estas en Britujo kaj Ĉeĥoslovakujo. Pli da geonkloj kaj eĉ pli da genevoj estas bezonataj. S-ro Sullivan ne deziras nur listojn de nomoj. Infano mem skribu leteron kun, se eble, respondkupono.

Dank'al donaco de la Societo de Britaj Esperantistaj Instruistoj kaj du helpemaj individuoj, estas kreditsaldo.

Kelkfoje venas plendoj pri nerespondo, kelkfoje ĝojiga informo pri sukceso. Plejofte la gvidanto ne scias kio okazas. Adreso: J. H. Sullivan, 3, Berwick Avenue, Urmston, Manchester, Anglujo.



Solenaĵo omaĝe al L. L. Zamenhof en la Domo de Medicinistoj, Moskvo. Paroladas N. F. Danovskij. Ĉe la tablo, tria de maldekstre, estro de la Esperanto-sekcio d-ro E. T. Salnikov.



46-a Universala Kongreso de Esperanto

Harrogate 5.VIII - 12.VIII 1961 Britujo

Korespondadreso: 46-a Universala Kongreso de Esperanto - Harrogate.
Telegrafo: Esperanto Harrogate.
Banko: Midland Bank Ltd, Harrogate.

Oficiala Antaŭkongreso kaj Seminario "Oriento-Okcidento (Londono 2-4. Aŭgusto 1961): S-ro Victor Sadler, 1 Poet's Road, Highbury, Londono N. 5

17-a T.E.J.O.-Kongreso (12-19, Aŭgusto 1961): S-ro T.G. Page, 90 Ross Street, Cambridge.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 3 novembro 1960

Prospekto pri Harrogate:

La Urbo Harrogate decidis eldoni en Esperanto plurkoloran turisman prospekton. Interesitoj povas mendi la prospekton ĉe la Kongresa Oficejo, aldonante unu respondkuponon por la afrankkosto.

Loĝado en Harrogate:

Jen provizoraj prezoj por loĝado en Harrogate:

Hoteloj	tranokto kun	kompleta
	matenmanĝo	pensiono
1-a katagorio	32/6 ĝis 42/6	47/6 ĝis 60/-
2-a katagorio	20/- „ 27/6	25/6 „ 45/-
aliaj „	14/-	21/-
Pensionoj	ek de 12/6	ek de 17/6

La matinmanĝo en Britujo estas kutime sufiĉe vasta kaj abunda. Pliaj detaloj kaj kondiĉoj por komuna loĝejo aperos en la Dua Komunikilo.

Brita vespero:

La Loka Kongresa Komitato decidis, ke dum la Universala Kongreso okazu "Brita Vesperto" kun enkonduka prezento pri la karakterizoj de la Kongreslando kaj respondado al liberaj demandoj.

Cseh-seminario:

La Internacia Cseh-Seminario okazos en Harrogate dum la Kongresa semajno. Ĝi daŭros 15 horojn. Kotizo: 32 steloj, pageblaj ĉe la Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, Hago, aŭ (por britoj) ĉe S-ro H. Holmes, 38 Fillebrook Road, London E. 11.

Prospektoj en Esperanto:

La Kongresa Komitato estas preta aldoni turismajn prospektojn en Esperanto al la kongresaj dokumentoj. Alsendoj devas esti antaŭe interkon-

sentitaj kun la Kongresa Oficejo en Harrogate.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 4

Decembro 1960

Speciala numero de

RADIO

Ciujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

		Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.	
Ĉiutage	15.30-16.00	Warszawa, 249m. (1205 kcs), 48.43m., 42.11m., 41.01m., 31.50m., 31.45m., 31.38m., 25.39m. Esperantaj disaŭdigoj, P. Pola Radio, Warszawa, Pollando.	
	10.50-11.00	Natal, 236m. (1270 kcs), 60.79 m. K. Radio Poti, Av. Deodoro 245, Natal, Brazilo.	
	14.00-14.15	Piraçununga, 198m. (1520 kcs). K. Rádio-Difusora ZYI 3, Piraçununga (Sao Paulo), Brazilo.	
	19.00-19.25	Sofia, 41.35m, 39.11m. P. Radio Sofia, Bulgarujo.	
	22.30-22.55	Sofia, 41.35m, 39.11m, 30.93m. P.	
Dimanĉo	23.35-23.55	Bilbao, 265m. (1133 kcs). P. Radio Bilbao, Hispanujo. (Horo varia dum unuhora diverslingva programo).	
	23.45-24.00	Rio de Janeiro, 441m. (680 kcs), 92.30m, 60.30m. K.I. Radio Copacabana ZYP 20/27, Avenida Rio Branco 277-17, Rio de Janeiro, Brazilo.	
	00.45-01.00	Juiz de Fora, 60.91m. I.P. Rádio Industrial, Rua Batista de Oliveira, 745, Juiz de Fora (Minas Gerais), Brazilo.	
	17.30-17.35	Bern, 48.66m, 31.46m, 16.87m. P. (D-ro Baur.) SRG., Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern, Svislando.	
	18.10-18.30	Valencia, 233m. (1285 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.	
Lundo	22.40-22.55	Hilversum, 298m (1007 kcs) P. N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).	
	02.00-02.30	Caracas, 476 m. (630 kcs), 48.62 m. P. Radiodifusora Nacional, Caracas (Venezuelo).	
	11.55-12.00	Bern, 48.66m, 31.46m, 16.87m., 13.94m. P. (D-ro Baur).	
	16.40-16.50	Wien. 513m. (584 kcs), 293m., (1025 kcs), 48m., 41m., 30m., 25m., 16m., 11m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.	
	17.55-18.10	Roma. 50.34m., 41.24m., 30.90m. P. Radio Roma, Casella Postale 320, Roma, Italujo.	
Merkredo	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.	
	23.00-23.15	Guatemala, 470m. (640 kcs), 48.54m, 30.98m. I.K. Radio Nacional T.G.W., Guatemala Cd, Mezameriko.	
	08.30-08.40	Paris. 280m. (1070 kcs), 235m. (1277 kcs). K. Esperanto-Office, Orleans (Loiret), Francujo.	
	11.55-12.00	Bern. Kiel marde P. (D-ro Privat).	
	22.00-22.15	Zagreb, 264m. (1135 kcs). P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.	
Ĵaŭdo	23.30-24.00	São Paulo, 62.83m. I.K. Rádio Progresso, São Paulo, Brazilo.	
	17.30-17.35	Bern, Kiel lunde. P. (D-ro Privat).	
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.	
	20.00-20.15	Vigo, 277m. (1082 kcs). K. La Voz de Vigo, Vigo, Hispanujo.	
	22.00-22.10	Hilversum 402m (746 kcs). I., V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.	
Vendredo	12.45-13.00	Rio de Janeiro, 214m. (1400 kcs) 31.42 m., K.I. Radio Roquete Pinto, Av. Erasmo Braga 118, Rio de Janeiro, Brazilo.	
	18.30-19.00	Rio de Janeiro, 375m. (800 kcs), 50.08m, 30.71m, 25.10m, 16.78 m. K.I. Radio Ministério da Educação, Praça da República 141-A, Rio de Janeiro, Brazilo.	
Sabato			

Radio Roma. 3-I, Tra la literaturo; 6-I, La universala blindultago; 10-I, Itala komponisto G. B. Pergolesi; 13-I, Leterkesto kaj bibliografio; 17-I, Italaj kanzonoj en Esperanto; 20-I, Roma baziliko de Sankta Agnesa ekster la Muroj; 24-I, Novaĵoj el Italujo; 27-I, La itala Relevo kaj Giuseppe Verdi; 31-I, Filatelo kaj Esperanto. Krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto. Prelegantoj: S-ro L. Minnaja kaj Prof. D-ro V. Musella.

Radio Zagreb. 5-I, Humuraj novjaraj deziroj; 12-I, Prezento de la jugoslavia verkisto Ivo Andrić; 19-I, Novaĵoj el teknika mondo; 26-I, Respondoj al korespondantoj kaj novaĵoj el la movado.

"British Esperantist" :

Brita Esperantista Asocio decidis dediĉi la januaran numeron de sia organo "British Esperantist" al informado pri la Universala Kongreso, Arta Festivalo kaj Kongreslokoj. La numero estas senpage ricevebla de la Kongresa Oficejo kontraŭ alsendo de du internaciaj respondkuponoj por la poŝtaj elspezoj.

Parkejoj :

La esperantistaj aŭtomobilistoj povos senpage utiligi la parkejojn en Harrogate.

Oficiala akcepto :

La Urbo Harrogate decidis akcepti kaj regali la tutan kongresanaron dum vespera muzika programo.

Specialaj favoroj :

La Urbo Harrogate decidis, ke la kongresanoj ĝuos jenajn avantaĝojn dum sia restado en Harrogate :

1. Senpagan eniradon en la Sunan Pavilionon kaj Sunan Kolonaron (normala prezo : 6 pencojn).
2. Senpagan eniradon en la Lounge Hall (normala prezo : 6 pencojn).
3. Senpagan tenisludadon en la Valaj Ĝardenoj (normala prezo : 2 ŝilingojn kaj 3 pencojn hore).
4. Senpagan uzadon de la miniatura Golfejo kaj aliaj ludejoj (normala prezo : 1 ŝilingon por ludo)
5. Senpagan eniradon en la Naĝbasenon (normala prezo : 10 pencojn hore).

Fakaj kunvenoj :

Anoncis fakkunvenon :

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj : publika pedagogia diskuto "Edukado por internacia kompreno en lernejoj". (Adreso : 183, Woodlands Park Road, Birmingham 30, Britujo).

Veterana Esperantista Klubo : "Memorigo pri fruaj agadoj" (Adreso :

S-ro Lewin, 33 Kingscroft Ave, Dunstable, Britujo).

Internacio de Militrezistantoj. (Adreso : 88 Park Avenue, Enfield, Mddl., Britujo).

Rotaria Klubo. (Adreso : S-ro Maurice Lewin, 33 Kingscroft Avenue, Dunstable, Britujo).

Kristana Esperantista Ligo Internacia : "Aktualaj problemoj en la mondo". (Adreso : Druivenstraat 32, Den Haag, Nederlando).

Arta programo por amatoroj :

En la kadro de la Arta Festivalo okazos Arta Programo rezervita al esperantistaj amatoraj artistoj. Rajtos partopreni nur altnivelaj amatoroj (debutantoj ne estos akceptitaj), kiuj kutimas prezenti programon. La amatora arango konsistos el skeĉoj, unu-aktaj teatraĵoj (maksimuma ludodaŭro : 15 minutojn), kantoj, ĥoroj, instrumenta ludado, k.s. (maksimuma ludodaŭro : 6 minutojn). Sinproponoj de individuaj amatoraj artistoj aŭ grupoj devos atingi la Kongresan Oficejon en Harrogate antaŭ la 28-a de februaro 1961. Ĉiu sinpropono devos esti akompanita de rekomendo de la landa Esperanto-Asocio aŭ de loka arta instanco kaj kompletigita per ĉiu necesa referenco. Neniu kandidato estos allasita al la programo, kiu ne respektos la fiksitajn limdatojn kaj la aliajn kondiĉojn.

Statistiko :

Argentino 2, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 3, Belgujo 9, Brazilo 4, Britujo 154, Bulgarujo 2, Danlando 5, Finnlando 3, Francujo 35, Germanujo 11, Hispanujo 16, Japanujo 2, Jugoslavio 18, 2, Hungarujo 1, Irlando 1, Israelo 3, Maroko 4, Monako 4, Nederlando 7, Norvegujo 3, Novzelando 1, Pollando 7, Svedujo 12, Svisujo 5, Sovetunio 1, Usono 2. Entute 318 el 28 landoj (Parsintjare 304 el 28 landoj).

Magnetofona sonbendo

Kun la celo instigi la esperantistojn en la tuta mondo aliĝi al la Universala Kongreso kaj por alproksimigi la kongresemulojn al la Kongreslando kaj al la kongrespreparoj, la Loka Kongresa Komitato de Harrogate preparis magnetofonan programon je dispono de ĉiuj Esperanto-Societoj.

La sonbendo daŭras entute 35 minutojn kaj enhavas paroladon de la Ĝenerala Sekretario de U.E.A., Prof. I. Lapenna, intervjuojn kun la Prezidanto de L.K.K., S-ro R.W. Hamilton, kaj kun Ges-roj Fighiera, alvokon de la infano Anlucia Delgado kaj mesaĝon de la Urbestro de Harrogate.

En la muzika parto oni povas aŭskulti la faman Sonorilon de Westminster "Big Ben", la popularan arion "Tipperary" en la originala ĝazklasika interpreto de la New Orleans ĝazorkestro de Terry Lightfoot, la "Cent Sakflutoj" ludataj de la Skota Gvardio, la Marŝon n-ro 4 de Elgar ludatan de la Reĝa Filharmonia Orkestro sub la gvidado de Stanley Pope, kaj kanton en Esperanto (la skota melodio "Annie Laurie") de la Temple Street Methodist junulara ĥoro.

La sonbendo estas eldonita en pluraj ekzempleroj, principe unu por ĉiu lando, kaj estas ricevebla mendante ĝin per simpla poŝtkarto al : 46-a Universala Kongreso de Esperanto, Harrogate (Britujo). La disponigo de la sonbendo okazas senpage, sed kontraŭ promeso ne reteni la sonbendon pli ol unu semajnon kaj sendi ĝin je propra zorgo al venonta utiliganto laŭ instrukcioj de la Kongresa Oficejo. Farigo de kopioj de la kongresa sonbendo estas permesata.

G. C. Fighiera,

Konstanta Kongresa Sekretario

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM-2 NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de decembro 1960.

N-ro 333

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de novembro kaj ankaŭ por komparo je la fino de novembro 1959 :

	1959	1960
Asociaj membroj	18685	20789
Individuaj membroj		
MJ	880	843
MA	5362	5035
MS	520	566
Pat.	7	5
DM	338	367
HM	45	43
JMJ	28	30
JMA	183	190
	7363	7079
	26048	27868

DELEGITOJ Aŭstrujo

Wels (Ober-Österreich) D : S-ro Franz Richter, komerco-dungito, Feldgasse Nr. 8.

Britujo

Doncaster (Yorkshire) : D : S-ro Alec L. Finbow, pastro (unitaria), 14 Imperial Crescent.

Tayport (Fife, Skotlando) D : S-ro Ellis Crapper, pensiulo, 16 Linksfield.
FD (filatelo) : la D.

Bulgario

Gabrovo D : S-ro Neno Janev, juristo, str. Orlovska 58b.

Ĉeĥoslovakujo

Brno FD (literaturo) : S-ro Jiří, Kořínek teksfaka kvalitisto, Merhautova 159, Brno 14.

Brno FD (turismo) : S-ro Josef Friedrich, emerita fervoja ĉefkonsilisto, Rezkova 28.

Gottwaldov D : S-ro Karel Chudoba, projektisto, Jiráskova Ul. 28, Gottwaldov II.

Jihlava FD (arĥitekturo) : vakas.

Kutná Hora D : vakas.

Ledeč nad Sázavou D : vakas.

Městec Králové D : S-ro Antonín Odehnal, pensiulo, strato Tyršova 162.

Plzen FD (matematiko): S-ro Vladimír Váňa, gastejestro, Křižíkovy sady 1.

Praha FD (maŝinoj) : S-ro Antonín Fingerland, pensiulo, U Riegrových sadů 4, Praha 2-Vinohrady.

Praha FD (pomologio) : S-ro Vladislav Brambora, pensiulo, Koněvova 24, Praha III.

Prešov FD (kristanismo) : S-ro Zoltán Marenčin, pensiulo, Plzeňská č. 17.

Prostějov (Morava) FD (tibeta kaj ĉina lingvoj) : vakas.

Úsilné (Čechy) D : vakas.

Vlastějovice (Čechy) D : vakas.

Zruč nad Sázavou D : vakas.

Danlando

Spjellerup FD (terkulturo) : vakas.

Finnlando

Helsinki FD (filatelio) : vakas.

Francujo

Clermont-Ferrand (Puy-de-Dôme) FD (fotografio) : vakas.

Cognac (Charente) D : S-ro Joachim Bejar, eksportisto de konjako, 23 rue de la Pyramide.

Montreuil (Seine) FD (turismo) : S-ro Maurice Rétot, instruisto, 162 boulevard Aristide Briand.

Saint-Etienne (Loire) VD : vakas.

Germanujo

Hann. Münden (20b) (Niedersachsen) D : D-ro fil. Hans Klötzer, instruisto, Am Wittenborn 20.

FD (kompara lingvistiko) : la D.

Höchstädt (Donau) (13b) D : D-ro Ludwig Röhl, notario, Marktplatz 14.

FD (juro) : la D.

Northeim i. Han. (Niedersachsen) D : vakas.

FD (kompara lingvistiko) : vakas.

Oberkirch (17b) (Baden) D : S-ro Hermann Heiss, industria komercisto, Winterbacherweg Weg.

FD (paperindustrio) : la D.

Oldenburg (23) (Niedersachsen) D : S-ro Uwe Joachim Moritz, studento, Am Festungsgraben 53.

Wiesbaden (16) (Hessen) FD (kemio kaj elektroniko) : S-ro Hans-Dietrich Neumann, kemio-teknikisto, Habelstr. 4.

Würzburg (13a) (Bayern) D : S-ro Karl Weller, oficisto, Huttenstrasse 3.

VD : S-ro Friedrich Volk, laborejestro, Matterstockstrasse 24.

Hispanujo

Vich (Barcelona) D : S-ro Jacinto Comella, artpentristo, Plaza Mayor 18.

Japanujo

Yamagata (Yamagata-ken) FD (medicino) : D-ro Hideo Shinoda, kuracisto, Kasumi cho, Yamagata-shi.

Jugoslavio

Beograd FD (fajrobrigadaj aferoj) : vakas.

Konjšćina (Hrvatska) D : vakas.
FD (instruado) : vakas.

Ljubljana (Slovenija) FD (farmacio) : vakas.

Mostar (Hercegovina) D : vakas.

Niš (Srbija) D : vakas.

FD (jurnalismo) : vakas.

Palić (Vojvodina) (Srbija) D : vakas.

Šabac (Srbija) D : vakas.

Titograd (Crna Gora) D : vakas.

Zagreb (Hrvatska) FD (terkulturo-selektado de plantoj) : vakas.

FD (tramtekniko) : S-ro Mihael Sirovatka, direktoro de tramlaborejo ZET, Masarykova 25/III.

Nederlando

Arnhem (Gelderland) FD (jurnalismo) : vakas.

Bilthoven (Utrecht) D : S-ro Johannes J. Roelofs, Sweelincklaan 62.

Deventer (Overijssel) VD : F-ino J. S. Douma, instruistino, P. Bothstr. 47.

FD (socikredito) : S-ro H. C. Magel, pensiulo, P. C. Hooftlaan 145.

Diemen (Noord-Holland) D : S-ro Ferdinand van de Oudeweetering, licea instruisto pri matematiko, Prinses Marijkestraat 53.

Eindhoven (Noord-Brabant) D : S-ro Ru Bossong, geodezia oficisto, Floraplein 23.

Krommenie (Noord-Holland) D : S-ro Jan Leguijt, komerca vojaĝisto, Landzichtlaan 45.

Pijnacker (Zuid-Holland) D : vakas.

Vianen (Zuid-Holland) D : S-ro Wilhelmus H. van Dongen, ĥemiisto, Stammershoefstraat 37.

Wormerveer (Noord-Holland) D : S-ro Wim Meijns, muzikisto, Paul Krugerstraat 13.

FD (ŝakludo) : la D.

Nov-Zelando

Christchurch D : S-ro William John Collins, ĝardenisto, 99 Sherbourne St.

Hastings (Hawkes Bay) FD (radio-jurnalismo) : F-ino Agnes Bray, ĵurnalistino, Radio Station 2ZC.

Wellington FD (Literaturo) : S-ro Bertram Potts, emerita verkisto, 34 Argentine Avenue, Wellington E 4.

Pollando

Częstochowa (Woj. Katowice) D : S-ino Teodozja Chada, oficistino, Częstochowa 7, ul. Ł. Ukasińskiego 85.

FD (virinaj aferoj) : la D.

Kraków FD (arkitekturo) : S-ro Edward Weroniak, arkitekto, Wrocławska 5A/5.

Sosnowiec (Woj. Katowice) VD : S-ino Helena Grabowska, mezlerneja instruistino, str. W. Ł. Reymonta 11-3.

Svislando

Genève (Genève) FD (muziko) : vakas.

Usono

Berkeley (California) D : S-ro Clarence Kittredge Sutcliffe, ekskon-tisto, 3049 Fulton Str. Berkeley 5.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1961

557 Weile, S-ro Knud, Donse, Pr. Hørsholm, Danlando;

558 Edler, S-ro Per, Göteborg, Svedujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1961

21. Bettges, S-ro Johann, Duisburg-Meiderich, 22. Bily, S-ro Harry, Berlin NW 21, 23. Gründler, S-ro Martin, Bad Homburg v. d. Höhe, 24. Vosteen, S-ro Karl, Hude, 25. Wagner, S-ro Hermann, Fürth (Bay), 26. Wehrheim, D-ro H., Hildesheim, ĉiuj Germanujo; 27. Hanson, S-ro Frank G., Regina, Sask., 28. Laigneau, F-ino A., West Vancouver, B.C., 29. Lewis, S-ro H.J., Halifax N.S., 30. Tuch, S-ino R., Toronto, ĉiuj Kanado.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Westergaard, S-ro H., Børkop, Danlando.

Lang, S-ino Maria, Schliersee Germanujo.

Orterer, F-ino A.M., Kreuth b. Tegernsee, Germanujo.

Schönrich, S-ro K., Wiesbaden, Germanujo.

Marin Gil, S-ro V., Barcelona, Hispanujo.

Mateman, F-ino W.M.P., Djakarta, Indonezio.

Sabijić, S-ro Božo, Osijek, Jugoslavio.

Šlat, S-ro J., Osijek, Jugoslavio.

Vujnić, S-ro Radivoj, Banja Luka, Jugoslavio.

Seckel, F-ino J.B., Almelo, Nederlando.

Kull, S-ro E., Korsnäs, Svedujo.

FONDAJO PROF. CANUTO

Antaŭa stato : 26 MA kaj 1 MJ.
S-ro F. Epstein, Germanujo 1 MA kaj 1 MJ; S-ro J. Vilkki, Finnlando 5 MA; S-ro V. Sadler, Britujo 1 MA; F-ino J. Le Rütte, Nederlando 1 MA; S-ro E. Zumbo, Italujo 1 MA; S-ro J. Boer, Nederlando 1 MA; S-ro C. E. Peterson, Usono 2 MA.

Entute : 38 MA kaj 2 MJ.

Ĉiuj kontribuu por membrigi esperantistojn en nepagipovaj landoj, honore al la nobla prezidinto de UEA.

FONDAJO ZAMENHOF

Antaŭa sumo : 18434.35 gld.

Ges-roj Laurie, Britujo, 47.61 gld.; T.T., Finnlando, 11 gld.; Esperanto-Grupo Moyá, 1 gld.; S-ro J. Figueras, —.63 gld.; S-ro Lópes, Solbres, 6.30 gld.; S-ro V. Marin, 6.30 gld. Hispanujo; S-ro Ing. A. Veršinin, 2 gld. Sovetunio.

Entute 18509.19 gld. je 1.12.1960.

Daŭrigu vian kontribuadon por subteni la plian agadon de la Asocio, por firmigi la poziciojn akiritajn dum la Zamenhof-Jaro !

GENERALA KASO

Kav. H. Clowes, Stoke-on-Trent, Britujo, 10,85 gld.; S-ro Søren Andresen, Danujo, 23 gld. kaj 25 gld.; S-ro K. Dinges, 7,60 gld., S-ro K. Willer Germanujo, 2,02 gld.; S-ro C. Garson, Usono, 1,13 gld.

Al ĉiuj donancintoj tre koran dankon.

M. H. Vermaas
Direktorino C.O.

ANONCETOJ

Kongresa Esperanto-Ekspozicio. Okaze de la 11-a Argentina Esperanto-Kongreso, okazonta en Rosario la 30-an de marto 1961, oni aranĝos imponan ekspozicion. Bonvolu sendi rapide afiŝojn, revuojn, poŝtkartojn, prospektojn kaj aliajn esperantaĵojn. Nepre ni dankos per kongres-poŝtkarto. Adreso: Casilla Correo 44, Rosario, Argentino.

Diapozitivojn 24 x 36 mm pri Esperantaj okazaĵoj, pejzaĝoj, landaj kurtimoj, urboj ktp. (kun aparta klariga teksto) mi interŝanĝas, kvanton kontraŭ kvanto. Rekte sendu al S-ino Elva Kohei, Carrasco 1423, Rosario, Argentino.

Magiistoj atentu! Korespondado pri magio kaj interŝanĝo de magiaj ideoj, precipe kun ne-eŭropaj landoj estas dezirata de: Hubert Reinisch, Graz, Am Hofacker 5, Aŭstrio.

Skoltoj en 19 landoj abonas al "La Skolta Mondo" kaj Skolta Esperantista Ligo. Informpetu de Charles Bardsley, 42 Westbourne Street, Oldham, Lancs., Britujo.

Belan frontispicon havas nova eldonaĵo "William Penn", majstra prelego de Prof. D-ro E. Privat. Eldonis Kvakera Esperantista Societo, Bath

Road, Ventnor I.W., Anglujo. Prezo 3 resp. kup. aŭ 3 steloj.

Deziras aĉeti Volumon 1 de "La Revuo" (binditan) 1906-7. Jam havas 2-5 inkluzive (ĝis 1911); se aliaj ekzistas ĝis la morto de Zamenhof, ni volonte aĉetos ankaŭ. Laurie, 6 Marlborough Road, Bournemouth, Britujo.

Esperanto-Civito decidas komenci per pensiuloj. Se vi ne plu laboras aŭ baldaŭ emeritiĝos, pasigu la vivreston en esperantisma medio de veterana elitaro. Via lasta servo estu plej trafa; aliaj sekvos vian ekzemplon, storigante propran kvartalon. Familianoj bonvenaj. Nepre vizitu Dovron survoje al Harrogate. Se vi interesiĝas pri maljunulejo, skribu al D. Soleo, 14B Castle Avenue, Dover, Britujo.

Nassif Isaac anoncas sian adresŝanĝon de Kuwait al: P.O. Box 936, Cairo, Egiptujo.

Korespondo-servo de la Franca Esperantista Unuiĝo peras internacian korespondadon de esperantistoj en la tuta mondo. Indiku aĝon, temojn, landojn deziratajn. Adreso: S-ino Jeannine Vincent, 13, avenue de Gaulle, Les Andelys (Eure). Francujo.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn: S-ro Alfred Mayer, Zeppelinstrasse 35, (17a) Karlsruhe-West, Germanujo.

20 mezlernejanoj 15-18-jaraĝaj kaj kelkaj el iliaj profesoroj serĉas samspe-

cajn korespondantojn el ĉiuj landoj. Skribu al L. Király, Szigligeti Ede-
tér 2., Miskolc, Hungarujo.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Gasthuisstraat 68, Tilburg, Nederlando.

Literaturisto dez. amikece diskuti problemojn de literaturo, arto, edukado. Ankaŭ interŝanĝi p.m., petas p.m. pri sporto, naturo. U.S.S.R., Jaroslavl, P.O. Box. N. 31, Prof. A. Semenov.

Deziras interŝanĝi afrankitajn bildkartojn kun Azio, Afriko, Aŭstralio kaj Suda Ameriko: Erik Bengtson, Ljungholmsvägen 19, Falkenberg, Svedujo.

Geamikoj, sendepende de nacieco, aĝo kaj saĝo, ni interŝanĝu altvalorajn pensojn, ideojn, vivospertojn kaj afablaĵojn por ĝojigi kaj pliriĉigi unu la alian: S-ino Granlöff, Hagavägen 22C, Skönsberg, Svedujo.

Por propagandi, montri ke Esperanto vere vivas, mi bezonas p.k., esperantaĵojn. Multnombre skribu al Madeleine D'Estries, 1346 Gardiner Dr., Bay Shore, N.Y. Usono.

Usono. S-ro Leif Heilberg (28 jara), 447 Cole Street, San Francisco 17, California, d.k. kun nudistoj, naturistoj, pri organizado de grupoj en UEA kaj INF.

Unua kaj unika libro pri fiŝoj en Esperantujo

Sekretoj de la Marestaĵoj

de Petar Giunio

reverkita de Lic. Marinko Ĝivoje

eldonita sub aŭspicioj de UEA

"Scienca laŭ enhavo ĝi estas beletra laŭ vestaĵo"
— diras pri ĝi E. Balech en la enkonduko.

En ĉi tiu intereseĝa, streĉa kaj instrua romano pri marestaĵoj la aŭtoro senvualigas al ni la sekretojn de la maro — lulilo de la vivo sur nia planedo. Riĉaj plurkoloraj ilustraĵoj.

Naĝado kaj fotografado sub la marnivelo iĝas pli kaj pli populara. Ekkonu tiun mondon!

Jen titoloj de kelkaj ĉapitroj: Nevidebla martrezoro; Defendo per kemiaj armiloj; Interesaj kooperativoj; Bestoj kun inkujo; Lertaj aviadistoj; Fiŝoj aŭdigantaj voĉon; Venenaj fiŝoj; Fiŝo kun segilo ktp.

Provizora prezo: 5.— gld., 20 steloj.

El ĉiuj landoj kiuj povas pagi al Okcident-Eŭropo mendu pogrando kaj podetale ĉe U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando.

El popol-demokratiaj landoj mendu same ĉe S-ro Marinko Ĝivoje, Gornji Trg 31/II, Ljubljana, Jugoslavio.

La nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de

Prof. G. Waringhien

kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj

aperas ĉiun duan monaton

32/40 paĝa - - poŝtformato jare fr. fr. 400.- aŭ
egalvaloro

Ricevas la abonojn:

En Francujo: R. Fiquet, Poŝta konto 2259-98
Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj
de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio: 7 Av. Léon Gourdault
Choisy-le-Roi (Seine) Francujo.

Administracio: 5 Bd. Stalingrad
Nice (A.M.)

BINDITA JARKOLEKTO 1960

en plaĉa verda tolo

Prezo: 9.— gld.; 36 steloj.

Por MA de tiu jaro duona prezo.

Kvanto limigita!

Mendu tuj ĉe U.E.A.

BONVOLU TUJ PAGI VIAN KOTIZON 1961!

La Memorlibro

pri la

Zamenhof-jaro

Monumento al la aŭtoro de la
Internacia Lingvo

Riĉa fotomaterialo

Elegante bindita en bonkvalita tolo kun
stampo en oro

Prezo : 12,50 gld.
50.— steloj

Havigu al vi ĉi tiun valoran verkon !

Eldonis C.E.D. Mendu ĉe U.E.A.
Eendrachtsweg 7 — Rotterdam

FERMENTARIO

GRAVA VERKO DE UNIVERSALA VALORO
unu el la ĉefaj de la urugvaja pensulo
D-ro CARLOS VAZ FERREIRA

El la hispana lingvo tradukita de Prof. Manuel
Fernández Menéndez kaj reviziita de
Akademiano D-ro L. C. Porto Carreiro Neto kaj
Prof. Ismael Braga.

Aldone biografio kaj portreto de la aŭtoro kaj
antaŭparolo kaj glosareto de la tradukinto.
Volumo : formato 21 × 15; 264 paĝoj; bona papero;
bone bindita per kartoneto kun bela kovrildesegno.

Jen pluraj temoj el la ENHAVO :

Pri "karaktero" — Principoj — Falsaj antitezoj en
la moralo — Moralaj krizoj — Moraligistoj — Pri
morala konscienco. — Moralaj juĝoj — Pri la
Historio — Racio kaj sperto. — Opozicioj esencaj
kaj neesencaj — Pri demokratio — Pri psikologio
de la genio — Pri Frenezo — Pri aĝoj — La
mondo de la arto kaj la mondo de la scienco —
Por serĉi la veron — Pri sistemoj — La religioj
kaj la homoj — Antaŭveni al la problemoj —
Scienco kaj metafiziko — Pri la instinkto de sen-
morteco — Aktuala paralogismo — Psikogramoj
(kolekto da originalaj pensoj la plej diversaj) —
Reagoj (juĝoj de la aŭtoro pri Spinoza, Comte,
Taine, Renan, V. Hugo, Goethe, Verlaine, Rousseau,
Stuard Mill, La Bruyere, Dickens, P. Bourget,
Balzac, Zola, Ibsen, Unamuno, Hellen Keller
Tolstoj, Bach, Mozart, Beethoven, Wagner, Schu-
bert, ktp.) — Pseŭdo-humoro (kolekto da sagacaj
kvazaŭhumoraj komentarioj) — Kia estas la mo-
rala signo de la homa maltrankvilo? (gravega).

Prezo US \$ 2.00 (du dolaroj) afrankite
La libron liveras UEA, la diversaj libroservoj
kaj la eldoninto

URUGVAJA ESPERANTO-SOCIETO
Calle Yaguarón 1397 - MONTEVIDEO (URUGVAJO)

ELDONO : Ĉina Esperanto-Ligo

VIVU LENINISMO

ĵus aperis

VIVU LENINISMO konsistas el 3 artikoloj
eksplikantaj la valorajn
instruojn de V. I. Lenin tuŝantaj la plej gravajn
aktualajn problemojn de la nuna mondo, kiuj inte-
resas ĉiujn pacamajn kaj serioze pensantajn
esperantistojn :

*Kia estas nia epoko ?
Kie kuŝas la fonto de la milito ?
Ĉu nukleaj armiloj decidas la sorton de
la homaro ?
Kiel oni efike defendu la pacon ?*

Formato 20 × 14 cm., 102 p., presita sur bonkvalita
papero.

Prezo : 1 gld., aŭ 4 steloj.

ĈINA ANTOLOGIO

15.3 × 23 cm., 412 pĝ. en bela bindo,
kun 14 bildoj, inkluzive 3 kolorajn.

JEN la plej granda, ĝis nun aperinta, Esperanta
libroeldono en Ĉinio.

La Antologio ampleksas 10 jarojn (1949-1959),
dum kiuj la ĉina popolo sin liberiginta, komencis
reorganizi sian vivon kaj rekonstrui sian landon.

La Antologio, en kiu estas prezentataj 30 poetoj
kaj novelistoj per 16 noveloj, 3 skizoj kaj 21 poemoj,
helpas al la legantoj ekkoni la rejuniĝintan ĉinan
popolon, kun ĝiaj suferoj, luktoj kaj renaskiĝo.

Prezo : 7 gld., aŭ 28 steloj.

EL POPOLA ĈINIO

Esperanta revuo dumonata, aperanta en 40-paĝa
kajero (19 × 26 cm.) riĉe ilustrita kun multkolora
kovrilo,

informas vin pri :

la konstruado, popola vivo, kulturo, arto kaj
literaturo, fundamentaj scioj, Esperanta movado
de Ĉinio.

LA ABONTARIFO POR 1961 :

2.50 gld., aŭ 10 steloj

Aĉetebraj ĉe UEA aŭ perantoj de
"EL Popola Ĉinio" en diverslandoj.

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam.